**96** (114) NOVEMBRO / DECEMBRO 1991 ISSN 0150-5823

# Laŭte!


**DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO**

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE
Abono por 1992: En Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF
Ĝiri al : **CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS**
Pĉk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

Vivo de Laŭte! paĝo 2
**Nia debato** : TELEVIZIO 3
(H.Castiau, Pako, Patriko, Suzanne, Nicole D., Gbeglo Koffi, Ĵanseb, J.G., Garolo, Tereza)
**Vortoj de Maljunulo** 17
(Valo)
Laŭte pri Rok-Gazet' 24
SAT-Amikaro '92 25
Enmemiĝo aŭ konfuziĝo de mi (Gbeglo Koffi) 27
Karto de M. Bartovská 28
Iom pri ekonomio kaj libereco (J.Manceau) 29
Iluziaj realaĵoj (Leereveld) 32
Al kongres' ! (JCR) 35
Sur vojo al aŭskulto de esperanto (S. Stepanow) 37
**Ĉies voĉo** : J. Manceau, H. Castiau, J. Deker, Jopo,
Ergoto de Bonaero 41
Ekflugo (M. Freud) 50
Rolo de l'virinaro 52
(Lopez Luna)
La hungara etna minoritato en Transilvanio (Berenyi) 53
Nasrudin 54
Frenezula afero :
la etna naciismo (J. Deker) 55
Iom da gramatiko 57
Pri la morala libereco 58
(E. Jamart)
Ĉu ekzistas vojo al feliĉo? 61
(H. Castiau)

Jen estas la

**ENHAVO !**



# VIVO DE "LAŬTE!"

## Al la ekstereŭropaj legantoj de LAŬTE!

Meze de aŭgusto, la poŝta administracio en Francio plialtigis sian tarifon kaj samtempe draste modifis la kondiĉojn de ekspedado de poŝtaĵoj ekster Eŭropon. (Eŭropo ĉi-rilate inkluzivas la orienteŭropajn landojn, ankaŭ Sovetion).

Tiel preskaŭ duobliĝis la tarifo por sendi al Ameriko, Japanio, Aŭstralio..., kie **Laŭte!** havas kelkajn abonantojn. Ni do devas fiksi jenan diskriminacian (ve!) abonkoston por 1992 :

- Eŭropaj landoj : senŝanĝe, 60 FF.
- Aliaj landoj : 80 FF

Ni ekzamenos denove la bilancon fine de 1992 por decidi, ĉu kaj kiom plialtigi la abonprezon.

## Al la legantoj de L! en Germanio

Iom simila malafablaĵo okazis ankaŭ en Germanio. La germana poŝtbanko masive altigis la tarifon por pagoj al eksterlando : 10 DM por ĝiro de germana al eksterlanda poŝtkonto, 15 DM por pagi ĉe giĉeto ĝiron al eksterlanda poŝtkonto. Por eviti tion, ni konsilas al la germanaj legantoj de L! sendi sian reabonon (20 DEM) al
Libera Esperanto-Asocio, Sonderkonto Bücherdienst
Poŝtĝiro Karlsruhe 2125 01-759, BLZ 660 100 75
La adreso de la peranto estas Manfred Führer,
Am Stadtpfad 11, W-6236 Eschborn. Tel: 06196-46194

## Al la broŝurabonantaro

Ĉar ne aperis novaĵoj en 1991 kaj ĉar ne estas projektoj ĉi-rilate en 1992 (krom se la posedantoj de manuskripto mem pagus la eldonkoston por garantia kvanto), tial la mono provizita de la broŝurabonantoj estos uzata unue por la pago de la reabono al **Laŭte!**, due por eventualaj mendoj de jam aperintaj broŝuroj, aŭ, tute laŭ la deziro de la monprovizintoj, inkluzive de la resendo al ili.
Tiu esperеble provizora endormiĝo de la servo celas ĉefe malplipezigi tro plenajn bretojn kaj kompreneble la ŝultrojn de via sindonema, sed superŝutata Kribo.

Sur la lasta paĝo : pliaj informoj pri la reabono

# nia debato

## televizio

### LA TELEVIZIO MALUTILAS AL LA HOMA SPIRITO

En la jaro 1930 aperis libro de la franca Duhamel : "**Scenoj el la estonta vivo**". Jen tradukaĵo de eltiraĵo pri la kino, terura antaŭdiraĵo.

"Tio (la kino) estas amuzaĵo por stultaj helotoj, tempopasigilo por analfabetoj, por mizeraj estaĵoj, mirstultigitaj per la laboraĉo kaj la zorgoj. Tio estas ruze kaj science venenigita nutraĵo por homamaso, kiun la fortoj de la homavida Moloĥo juĝis, kondamnis kaj kies malnobligadon ili elfinas.

Spektaklo kiu postulas nenian strebon, kiu necesigas nenian logikan pensadon, naskas nenian demandon, serioze pritraktas nenian problemon, ekflamigas nenian pasion, eklumigas funde de la koroj nenian brileton, vekas nenian alian esperon, ol tian, ridindan, iam esti "stelo" en Los Anĝeles.

(...) Ĉio estas planita precipe por ke la homoj havu la okazon nek enui, nek pripensi, nek diskuti, reagi, iel partopreni. Kaj tiu terura ilo, farĉita per imponegaĵoj, lukso, muziko, homaj voĉoj, tiu ilo por stultigi kaj malvirtigi, hodiaŭ kalkuliĝas inter la plej mirindaj potencoj en la mondo."

Pri G. Duhamel (1884-1966) mi ne skribos multe, nur ke li estis unue kuracisto. Li fariĝis akademiano en 1935; poste, ekde 1942 ĝis 1946, sekretario de la Akademio. Lia verkaĵo "**Scenoj el la estonta vivo**" estis akra kritiko al la usona normigita vivo. Oni trafe konturas lin, dirante ke li posedis "la inteligentecon de la koro". La scivolemulo konsultu sian enciklopedion!

Ĉu tiuj konsideroj pri la kino, precipe pri ĝia potenco, tiom validas kiom Duhamel antaŭvidis? Ŝajnas ke ne, ĉar, iom post iom insideme, kun naiva mieno, la televizio venkis la sepan arton en tiu stultigado de la homoj. Tiom ke nun ĝi perturbas nian socian vivon.

Inter aliaj, du gravaj faktoroj akcelis la malican rolon de la televizio. Unue, ĝi, perfortante la pordojn de la hejmoj, fariĝis ĉiutaga eliksiro por la homoj. Due, la enkonduko de la reklamo sur la malgranda ekrano lokis ĝin sub la povon de nia malnova amiko : la "Ora Bovido".

Mi ne intencas tedi, mi do ne citos liston da ekzemploj pri perversaj efikoj de la nuna televizio. Ili estas sufiĉe multnombraj kaj konataj.

Tamen, okaze de la terura milito, kiu disvolviĝis en la Meza Oriento, oni atingis la apogeon de maldeca uzado de la televizio. Unue, ĝi preparis la publikan opinion al tiu milito. Poste, ekde kiam la milito komenciĝis, la ĵurnalistoj transformis tiun teruraĵon, kiu postulas sian ĉiutagan porcion da mortintoj, ĝis spektaklo komparinda al grava sporta evento. La onidiro eĉ asertas, ke la usona stabo eksplodigis la militon je horo taŭga por la usonaj televiziprogramoj.

Ĉio ĉi konfirmas la antaŭdiraĵon de Duhamel. Urĝas, ke oni savu ĝin el la manoj de la politikistoj kaj de la vendistoj de lesivo, kiuj, pli ol oni ĝenerale supozas, havas la saman intereson stultigi al homojn.

Se ni deziras ke, morgaŭ, nia idaro havu ion alian en la kapo ol amelo taŭga por ĉiuj saŭcoj, ni devas postuli, per ĉiuj rimedoj, kiujn la demokratio metas je nia dispono, tute sendependan televizion.

Ĉu estas jam tro malfrue?

Ĉu eblus ke ni jam estus la unua stultigita generacio?

Henri kaj Julia CASTIAU





**PAKO** : *Ne indas komenti la vortojn de Duhamel, kiuj, laŭ mi, simple esprimas malkuraĝan timon aŭ elreviĝon pro tio ke la homaro marŝas ne tiel kiel li volas. Ĉi tio ŝajnas kutima sinteno de la intelektuloj ĉiam kiam ili konstatas ke la socio ne laŭiras la vojon de ili montritan, aŭ io nova kontraŭanta ilian idearon aperas (kino, televizio, komputiloj, Esperanto, ktp). Nur direndas tio, ke oni povas spekti kinon, aŭ televidi, sen stultiĝi, ĉar tiuj iloj povas esti tre edukaj, kaj precize tial ili povas esti tre stultigaj, precipe se ili kuŝas en la manoj de la potenculoj de la sistemo - aŭ "nova mondordo" -, kio ja estas fakto. Ni do kritiku la fiuzon de la televizio, kio nin nun okupas, sed ne kondamnu ĝin pro ties ekzisto.*

*Kutima kompara kritiko de la intelektuloj al la televizio estas tio, ke la libroj enhavas la tutan pensadon de la homaro plej libere kaj pluralisme esprimitan, kio ja mankas en la televizio. Nu ili nur parte pravas. Mi konsentas ke la skribaj verkoj estas la ujo kie plej profunde, amplekse kaj analize ni, homoj, pritraktas ĉion ajn; sed pri la pluralismo de la libroj kulpas nur tio, ke la potenculoj de la sistemo disponas je alia pli potenca "edukilo" : la televizio. Alimaniere dirite, la libroj estas tiel mirinde belaj, liberaj kaj liberigaj tial ke la mastroj de la mondo ne bezonas fiuzi ilin. Ĉi tio klare videblas en la gazetaro, kiu, kvankam skriba, estas tamen mensoga kaj al siaj mastroj utila.*

*Nu, jen mi tuŝis la, laŭ mia opinio, kernon de ĉi debato : la informado kaj ties manipulado ; tio estas, ni scias kion kaj kiam oni volas ke ni sciu. Malgraŭ ke la komunikiloj iĝis plej rapidaj kaj ĉienatingaj, nur kelkaj informagentejoj monopoligas la konon de la novaĵoj kiujn tuj ni televidos aŭ pri kiuj morgaŭ ni legos en ĵurnalo. Ĉi tiun mondskalan monopolon akompanas alia landa aŭ loka manipulado kiu "informas" pri niaregionaj aferoj. Nur sendependaj komunikiloj fidindas, sed ĉu ni povas certi ke tiaj ekzistas? Ĉu ni ĉiuj ne havas interesojn de kies vidpunkto ni rigardas?*

*Foje, aŭ pli bone dirite, ĉiam kiam ĵurnalisto sin nomanta sendependa parolas pri televizio - aŭ gazeto - sendependa, li volas diri "sendependa de la registaro", nur malmultfoje oni kritikas la ekonomian aŭ ideologian dependecon, kiu preskaŭ ĉiam estas kaŝita al la televidantoj - aŭ legantoj -, kaj kiu estas fonto de manipulado same kiel la politika dependeco. En Hispanio oftas la kritikoj de "sendependaj" ĵurnalistoj kontraŭ la televizia fiuzo, kiun la registaro kaj ties partio faras dum kaj maldum la balotaj kampanjoj. Oni taksas la ĵurnalistojn de la publika televizio kiel aĉetitojn de la potenco, se ne paroli pri manipulado kaj cenzuro. Tamen tiuj "sendependuloj" tute silentis kiam la ĉefredaktoro de iu privata televizio, post atingo de permeso por intervjui Sadam Husein, devis peti permeson de grava akciulo, kiu krome estas la estro en Hispanio de la Kuvajtia Investo-Oficejo, kaj kiu akceptis kondiĉe ke oni elsendu prikuvajtian raporton favoran tuj post la intervjuo. Nu, ĝuste tiel okazis. Kiel "sendepende"! Ĉu ne?*

*Kion mi pensas, resumiĝas do en unu ideo: la monopolo de la informado estas tio kontraŭ kio ni devas lukti, kaj due (aŭ samtempe) ni strebu por ke ni povu aliri la bildkomunikilojn, kio teknike tre facilas; pli laboriga estos la atingo de nia unua celo.*

**Patriko** : "Televizio" ?! Tiel do "pokapoke prosegas E° sian kaminon sur la via del internationalisation, sed illo es un altre debatto", ĉu ne...

Pri televido, la direndaĵo jam estas dirita de Pako. Televido estas samkiel Tero : ĝi povas esti ĉu paradizo, ĉu infero. Kaj tro ofte ĝi iĝas infero, precipe en Francio kie nenio rajtas ekzisti se ne pasinte ĉe l' tele'... La rezulto estas brutigado kaj manipulado de la gento far la registaroj kaj lobioj (t.e. registaro de registaroj). Tiel oni konvinkas popolon pri neceso de milito (maljusta) kontraŭ Irako. Tiel ankaŭ perfektiĝas la unuigo/integrigo de la planeda loĝantaro kies avantaĝo povos esti internacia, tutmonda komunikado kaj lingvo kaj kiam revenos mesio surteren, ĝi nepre bezonos televidon por alparoli ĉiujn popolojn... Ĉu do televido estu planitaĵo de Dio por provadi kaj savi la homojn? Ĉu ni ne bezonas ne nur saman lingvon sed ankaŭ okulojn kaj orelojn kaj... koron?

"Kaj estos nur unu ŝafaro
Kaj unu paŝtisto
Kaj televido kaj Esperanto..."

Televido, telefonio, telepatio... Ni telehomoj pli kaj pli telehomadas en telehomio, do mi telesalutas vin teleamike. Kaj ĝis tele-revido! (ĉar revido estas la ido de l' revo...).

***Suzanne*** :

Samtempe kiel mi sciis la debattemon, mi legis en gazetoj, argumentojn, kiuj estos plejparte mia kontribuaĵo, ĉar ili pli bone ol mi farus, klarigas mian opinion. Mi tute konsentas pri tiaj argumentoj!

*"Kiam ni malkovros, ke la televizio estas ideala ilo por manipuli la popolamason, ĉar ĝi troigas; ĉar ĝi sciigas malpli da informoj ol impresojn; ĝi malpli elvokas la racion kaj la pripensadon ol la sentojn; ĝi postlasas sensacojn, kaj precize en tio ĝi estas danĝera".*

En tiu nia tempo de troa ne-informado, oportune aperas libro pri tiu temo, kies titolo estas "Mensogoj de amaskomunikiloj". El la recenzo mi notis rimarkojn, kiujn jam mi sentis:

*"(...) de la "rumana revolucio" (laŭdire) ĝis la "Golfa milito" la grandaj amaskomunikiloj strebas por ke ni glutu ofendojn (...) politikajn celojn, komercajn celojn. Antaŭ la pezo de la mono kaj de la politikaj ambicioj, la vereco de la faktoj ne multe pezas. Ĉiuj, televizio, radiofonio, rakontis pri la murdo de pastro Sopielusko, dum la pastroj en Latina Ameriko estis mortigataj oni daŭre silentis.*

*La mito de la Timisoara kadavrejo", la "Pekina printempo"... La amaskomunikiloj manipulas la bildon kaj la dirmanieron. Ili orientas la opiniojn de la plejparto de la popolo, lerte aldirektante la informadon favore al la reganta potenco (ŝtata).*

*"La rolo de la ĵurnalistoj, fundamente, estas servi la celon de la posedantoj de la amaskomunikiloj, tiri monprofiton, kaj por tio, publike laŭdegi kaj defendi la liberecon de entrepreno, tio estas, la liberecon ekspluati."*

En 1953a, komence de la televizio, iuj, inter ili A. Robin, antaŭvidis la naskiĝon de ilo celanta perfektigi "la entreprenon de universa psika subpremado".

*(...) Sufiĉas iom pripensi, kaj memori la kondiĉaron de tiu epoko. Ekde tiam la bildaparato logike estas uzata por timindaj agadoj de subpremo mensa, distance. Estas neeble, ne provi uzi tiun aparaton, celante submeti, magnetizi, de malproksime, milionojn kaj milionojn da homoj; per ĝi hipnozo povus fali sur la cerbojn de tutaj popoloj, kaj tio preskaŭ ŝtele, dum la viktimoj ne ĉesas havi la impreson spekti plaĉajn spektaklojn (...). La senĉesa propagando celas persvadi, ke ne plu kompreni per si mem estas nur avantaĝo; la maŝino por "vidi" povas utili por naski novan specon de blinduloj.*

**Nicole D.** :

Se mi bone memoras, G. Duhamel kontraŭis ankaŭ la ĝenon, kiun povus okazigi telefonaparato hejme. Li estis distancafekta al tiamaj novaj teknikoj. Mi memoras ankaŭ ke ofte studentoj discitas liajn tekstojn pri tiu temo...

Mi ne volas aspekti nerespektema sed mi pensas ke akademianoj ne estas neeraremaj. Mi pensas ankaŭ ke oni povas miskompreni iliajn asertojn, ĉefe kiam oni legas nur eltiraĵojn.

Mi ne estas fanatikulino pri televido, nek pri kino, mi eĉ malofte iras al kinejo, rigardas televidon. Sed, kiel modernaj teknikaj kapabloj, servoj, kino kaj televido, laŭ mi, estas mirindaj : ili multobligas, riĉigas la kultureblecojn. (Kiuj ne memoras pri belegaj kaj bonaj filmoj, pri interesplenaj raportaĵoj, kulturfilmoj?) Ili estas grandskalaj komunikiloj, vere potencaj, kiuj permesas ege rapidajn informadojn tra la tuta mondo.

Ŝajnas al mi ke nur la uzado, la enhavo estas diskutendaj. Estas multo por diri pri la enhavo de la programoj, pri la administrado de televizio, pri ĝiaj politikaj celoj...



Jen la demandoj, kiujn mi faras : Kiuj devas estri, posedi tiujn komunikilojn, kulturilojn? Kial uzi ilin? Kiel kontroli ilin? Kiel komunigi ilin? Kiel eduki la spektantojn por ne plu mistifiki pere de televidaj programoj?

Feliĉe, ĝis nun, ŝajnas al mi ke en Francio neniu estas devigata rigardi televidon, aŭdi radio-elsendon, neniu estas trudita iri al kinejo por vidi (aĉan) filmon.

Sed mi scias la danĝeron posedi televidan aparaton hejme : ĝi povas inside instigi al pasiveco, submetigi al potenco de la bildoj, disvolvi neatentemon inter familianoj, forigi aliajn distrajn, kulturajn, informajn rimedojn, ktp. Konsciante la danĝerojn, necesas esti singarda, kritikema, saĝa, uzante televidon, ne necesas rezigni pri ĝi.

Bone, ke estu diversnivelaj, diverstemaj elsendoj, ne ĉiuj havas la samajn gustojn, emojn.

Sed konsterne estas scii, ke la plejmulto rigardas, postulas la plej idiotajn programojn.

Laŭ mi, estas progreso favori pluralismon, multobligi la programojn privatajn kaj publikajn, kondiĉe ke la publikaj vere havu sufiĉe da bonaj materiaj rimedoj por bone funkcii.

Plej grava progreso estas ebleco registri elsendojn, tiamaniere elekti kaj la enhavon de programo kaj la momenton por ĝin rigardi. Tio helpas al protektado de familia vivo, de amikaj rilatoj.

Eblas sin eduki al uzado de televido, eĉ necesas tion fari ĉe la infanoj, ekde ilia plej juna aĝo. Tro da plenkreskuloj sin detenas, lasante infanojn antaŭ televido dum multaj horoj tage, sen ia ajn kontrolo.

Estus bone, ke ĉiu lernu la mekanismojn, teknikajn kaj ideologiajn, kiuj funkciigas televizion, por bone scii ke fotoj, bildoj same kiel tekstoj povas esti falsitaj, adaptitaj, malkompletigitaj.

Vole nevole ni estas en mondo, kie scienca evoluo pli kaj pli rapide naskas novajn teknologiojn. Tiuj ĉi ne nepre estas bonaj aŭ malbonaj. Ofte ili perturbas, malstabiligas, maltrankviligas, ĉar pli kaj pli malsimplaj.

Por mastri ilin, kontroli ilin, kiel eble plej bone uzi ilin aŭ ilin rifuzi, necesas sin adapti, provi resti libera.

Ankaŭ televizio postulas de ni respondecajn sintenon, agadon.

*GBEGLO Koffi :*

*Eklegínte la titolon "TELEVIZIO" de la ĉenletero, mi pensis, ke mi pritraktos tiun temon, parolante pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de tiu ilo. Mi tute konsterniĝis, leginte la enkondukon de Henri kaj Julia CASTIAU, ĉar laŭ mi, la titolo estas ne "TELEVIZIO", sed "PERVERSAJ EFIKOJ DE TELEVIZIO", aŭ "MALBONA UZADO DE TELEVIZIO".*

*La vidpunktoj de Nicole D. ege interesas min, kio devigas min diri nur iomon pri la temo, ĉar mi ne ripetu kion alia jam rakontis.*

*Mi scias nenion pri DUHAMEL, sed mi asertas, ke li ne estas la plej perfekta homo de la homaro. Tiu perfekta homo neniel ekzistis, ekzistas, ekzistos, ĉar nia mondo ĉiam evoluas kun siaj loĝantoj. Ĉiu evoluŝtupo havas siajn karakterizojn, kio implicas, ke tiuj evoluŝtupoj estas malsamaj. Se iu diras, ke iu evoluŝtupo estas pli bona ol la alia, kompreneblas, ke tiu rakontas nur siajn vidpunktojn. "Kiom da homoj, tiom da pensmanieroj". Mi ne akceptas, ke oni ĉiam sekvu iun, pro la fakto, ke tiu "iu" estas akademiano, filozofo, pastoro, episkopo, papo, ministro, ktp, aŭ pro la fakto, ke al tiu "iu" oni jam aljuĝas multajn premiojn internaciajn. La perfektiĝemo de la ento HOMO devigas nin ĉiam pripensi la deklarojn de samhomoj. Neniu kulpas pri siaj asertoj, malkovroj, pensoj, ĉar ĉiu pensas, do rajtas ion deklari.*

*La televizio per si mem estas nek bona, nek malbona. Mi ne volas paroli pri (MAL)BONO, ĉar ĝi estas karakterizo vere relativa. Ni ne longe diskutu pri relativaĵoj, ĉar la diskutoj estos buntaj kaj paralelaj. Tamen, konsiderante leĝojn de iu medio, oni povas paroli pri bono kaj malbono. Tiuj leĝoj estas kompreneble altrudoj far grupeto da homoj al la aliaj sammediaj. Se ni akceptas, ke ĉiu medio havas siajn leĝojn, do ni rajtas diri, ke kiam oni malobservas leĝon, tiam oni malbone agas. Tiu malbono iumedia povas esti bonego alimedia. Mi do pensas, ke oni ne devas kondamni TELEVIZIOn, ĉar ĝi utilas por iuj, mal- sen-utilas por aliaj. Ankaŭ s-ro DUHAMEL neniel kulpas pri siaj pensoj.*



*Nicole D. jam diris, ke ĉiu homo havas siajn gustojn, emojn. La televizio ja ekzistas kaj dissendas diversajn bildojn, filmojn, elsendojn. Ĉu la farantoj de la televiziaj programoj kaj elsendoj kulpas pri sia laboro? Ili rajtas kaj devas dissendi ĉiajn bildojn, inter kiuj ĉiu elektu siaplaĉe. Ili neniel povas scii la gustojn de la tuta homaro, de ĉiu homo aparte. Ĉu oni povas scii, ĉu la elsendoj interesas la elsendantojn mem? Ĉu la filmo, kiun iu teksas maldeca, aliiu ne povas taksi deca?*

*Televizio per si mem estas nek bona, nek malbona, sed pro la fakto, ke ĉiu homo havas siajn gustojn, (mal)bono de Televizio eliras el buŝoj. Ĉu mi ne pravas, dirante, ke Televizio utilas kaj malutilas, decas kaj maldecas, bonas kaj malbonas, efikas kaj malefikas, ktp? Ĉiu do elektu tion, kio al li donas plezuron. Mi elkore dankas al s-ro DUHAMEL, kiu povis doni siajn vidpunktojn pri la afero; li neniel kulpas pri sia malŝato al Televizio, ĉar li tiel montris al ni siajn gustojn kaj emojn.*

**ĴANSEB :**

**TELEVIDO, ĈU IO PLI OL KVIETIGILO?**

(NB. Mi ne trovis "televizio"-n en la vortaro...)*

Mi ne havas televidilon. Mi ne havas tempon por spekti ĝin. Kiam tio okazas, mi estas **fascinata per la moviĝanta bildo**, kaj tio hipnotigas min, kiel fajro en kameno. Post la spektado, mi demandas min, kion tio alportis al mi. Ĝenerale malmulton.

Oni povas bedaŭri, ke televido, mirinda ilo por informo kaj eduko, uzatas (almenaŭ en Francio, aliie, mi ne scias) kiel **kvietigilo** por infanoj kaj malriĉuloj. Ege bedaŭrinde, vere.

Fakte, televido estas **la plej kredata** - se ne kredinda - komunikilo por amasoj. Do ĝi estas ilo de povo, de manipulado, kaj fonto de mono. Kaj tiel plu, aliaj jam bonege analizis la fenomenon.

Verŝajne, la legantoj de L! nenion povas ŝanĝi de tiu situacio. Oni nur rajtas revi pri pli bona televido por la estonteco, kaj esperi ke ĝi iĝu malpli kaj malpli "**amasa**".

Televido havas en si du potencajn eblecojn:

- Vido de movaj bildoj, pli kaj pli bonkvalitaj,
- Tuja sendo de tiuj bildoj al ĉiuj partoj de la tero, dank' al satelitoj.


Tiuj eblecoj indikas la vojojn por la estonta (dezirinda) televido:

Unue, **biblioteko da elsendoj**, laŭteme ordigitaj kaj atingeblaj per kabloreto. La spektanto uzus ĝin kiel publikan bibliotekon, kaj helpe de komputilo trovos la elsendojn kiuj interesas lin, male al la nuna sistemo, kiu instigas la homojn interesiĝi nur pri tio, kio interesas la plejmulton.

Due, **malfermitaj fenestroj** tra la mondo, ebligantaj vidi samtempe tion, kio okazas en alia kontinento. Oni povas imagi, post kelkaj jaroj, murojn da ekranoj en la stratoj, tra kiuj homoj de diversaj landoj povos reciproke sin vidi, aŭdi, kaj interŝanĝi impresojn kaj ideojn... en esperanto!

----

* Televizio. Tekniko k ĝenerala organizo de la televidado. (PIV, p.1093).
Tial ne necesis korekti... (N. de la red.)




*Muro da ekranoj...*



*J.G. :*

*Kiam aperis la kino komence de la 20-a jarcento multaj intelektuloj kiel G. Duhamel estis malfidemaj rilate al tiu nova arto, komparante ĝin al foira spektaklo valora nur por la stulta popolo. Sed rapide la sepa arto fariĝis vera arto komparinda al teatro, literaturo, ktp., kun siaj ĉefverkoj, sed ankaŭ siaj "fuŝverkoj". La bono kaj la malbono kunekzistis kiel en la aliaj flankoj de la homa aktivado.*

*La kino pritraktis ĉiujn temojn :*

- ***sociajn*** *: Ekz. filmoj de Chaplin, "La Vinberoj de la Kolero", "La Salo de la Tero", la italaj filmoj kiel "La ŝtelisto de biciklo"...*
- ***politikajn*** *: Ekz. "Z", "La Konfeso"...*
- ***kontraŭmilitajn*** *: Ekz. "Kvar el infanterio", filmoj pri la Vjetnama milito...*

*Oni povus plilongigi la liston de la temoj!*

*Laŭ mi oni ne povas konsideri kinon kiel nuran stultigilon de la homoj, kiam oni memoras tiujn famajn aktorojn : Chaplin, Raimu, Orson Welles, k.a. Kaj por la francaj filmoj la dialogojn de Jacques Prévert kaj Henri Jeanson. Certe, la mono ludis rolon kaj en la grava produktado de filmoj estis multaj stultaĵoj, sed ankaŭ kiom da ĉefverkoj, kiuj restas en la kapo de ĉiu el ni!*

*Pri televizio mi ne konsentas kun la titolo de la prezentado, sendube provokema! Televizio estas ilo, kiun oni povas uzi por diversaj celoj. Mi konsentas, ke nun pro komercaj premoj ĉe privataj "ĉenoj" kaj manko de financaj rimedoj kaj ankaŭ malbona uzo de ili ĉe publikaj ĉenoj, la situacio de la televizio, almenaŭ en Francio, ne estas bona, sed malgraŭ tio estas "bonaj" elsendoj, kiuj instigas la spektantojn pripensi la gravajn problemojn de nia epoko. Mi citas kelkajn : "La irado de la jarcento", "Speciala sendito", "La rajto scii", ankaŭ kulturaj elsendoj pri literaturo, kino-klubo, ktp.*

*Certe, estas multaj stultaĵoj : usonaj felietonoj, japanaj movbildoj (danĝeraj por la mensoj de la infanoj), ktp. Estas ankoraŭ vere, ke la "bonaj" elsendoj estas programataj tro malfrue dum la tago por la ne-*

*posedantoj de magnetoskopoj. Sed ĉu la vera problemo ne estas la edukado de la spektantoj, kiuj devus lerni kiel distingi " la bonan grenon disde la lolo"? Tiu edukado devus okazi jam en la lernejoj, poste per la kritiko de la programoj proponataj, kaj eble per asocioj de spektantoj.*

*Pri la Golfa milito estis alia problemo, ĉar la informoj estis monopoligitaj de la usona ĉeno C.N.N. La armeoj cenzuris la bildojn kaj la militistojn kontrolis ĉiujn informojn, sed ankaŭ ĵurnalistoj estis komplicoj de tiu misinformado. Kelkaj tamen protestis.*

*Konklude, mi opinias ke televizio estas grava rimedo, kun granda influo, kiu povas esti uzata en bona aŭ malbona direkto. Estas necesa la kontraŭpovo de la spektantoj.*

**Garolo:**

**TELEVIZIO : FARUNO EL LA SAMA SAKO!**

Mi volas diri, ke la problemo de la televizio estas la sama kiel la aliaj (falsaj) problemoj de la homo, ekde la establo de la ideala ŝtato, rekono de la vera religio de dio, pasante tra la drinkado, fumado kaj toksado ĝis la uzo de literaturo, de kino kaj televizio. La malutilo, la detruo, kiam ili ekzistas, apartenas al la individuaj karakteroj kaj virtoj de ĉiu kaj ĉiuj el ni. Niaj homaj agadoj ankaŭ en televizio spegulas nin mem ; kiel diras la ĉi-supra popoldiro, ĉio estas faruno el la sama sako.

Mi ĉi tie, pri la televizio, plene konsentas same kun Castiau, kiel kun J.G., ne ĉiuj programoj estas malkonstruaj sed multegaj vere malutilas, brutigas, kondiĉigas la individuon, ĝuste kiel tion volas la propraj homoj en la mito, kiu estas la kolektiveco (mia batalo jam de multaj jaroj). Vi (kiuj estas instruistoj) ĉu vi ne scias, ke la unua celo de la instruado estas formi la soldatojn (en larĝa senco), kiujn la monstraj ŝtatoj en ĉiuj nacioj bezonas? Nu, en la tuta mondo (kaj en Francio de G. Duhamel la televizio kompare al la aliaj estas vere milda) la televizio estas ja valorega instrumento por reklamado de la lesivoj, ankaŭ tiuj kiuj lavas la mensojn, por ideologia propagando



de niaj patrioj, por ĝenerala kondiĉado ankaŭ en konsumismo, do brutigado. Ĝi estas aparte taŭga por la analfabetoj (revidu la grafikaĵon en L! 93, paĝo 42), kiuj ja, nek legas nek skribas sed ankaŭ ne plu bezonas pensi. En la faveloj (kabanaĉaro) povas foresti la pano, sed la televidilo neniam. Kaj tion la homoj volas : ne pensi. Mi honte konfesas, ke mi estis 50-jara, kiam mi, stultulo, malkovris ke la homoj, en timiga procento, legas por ne pensi, eĉ kiam temas pri literaturo... aŭ Biblio-Korano! Do, kio pri la sonoj de radio-elsendado kaj pri la bildoj ĉe la televidilo? Ĉu ne temas pri perfektaj mensokupiloj? La homoj bezonas spegulon, kaj la ekranoj de la televidiloj estas la plej perfektaj speguloj, kiujn la homoj inventis. En ĝi aperas la tutaj melodramoj de la vivo, kie la homoj avide identigas sin... aŭ ĉu nia vivo ne estas felietona novelo, kie manifestiĝas niaj karakteroj de malvirtuloj?

Mi ne povas percepti, kiel iu "bona", "supera" homa institucio (la ŝtato) povas establiĝi... ja la ŝtato estas la plej trafa pruvo, ke la kolektiveco estas mito... instrumento, kiu plifortigas la homajn malvirtojn ĝis korupto, subaĉeto, nepotismoj, favorismoj ks. Amiko Castiau, ĉu la lastaj 70 jaroj de nia homa historio ne sufiĉe montris la neeblon de socialismo, komunismo? Tiuj 70 jaroj ne nur evidentigis la fiaskon de marksismo sed ankaŭ tiun de ŝtatismo. Sendube, se la homo, kiel individuo, bezonas esti regata, (ĉar ĝi ne kapablas sin regi) ne restas alia solvo ol rigida faŝismo, ekzemple "bona" diktatoro, kiel Musolini, kiu iam diris: "Ni estas la unuaj, kiuj asertis, ke ju pli la civilizaĵoj estas komplikaj, des pli ni devas limigi la liberecon". La televizio estas ja komplika civilizaĵo, kiu aperis post la diro de Musolini.

Mi persone ankoraŭ "kredas", ke la homoj iel rapide revenos al pensado, al konsciiĝo pri siaj propraj sintenoj kaj agadoj, ne nur por taksi la bonon kaj malbonon, sed tute simple por resti en la homkonformeco. Cetere, se tiu reveno ne okazos, ne estas dubo, ke la homaro tre baldaŭ finpereos. Kaj ne estas dubo, ke homo, kiu beate restas tage kaj nokte kroĉita je la felietonoj de la televizio, ne agas homkonforme. Se "demokratio" estas la regado de la popolo per la popolo, ni bezonas scii nur du aferojn. La unua estas, ke "popolo" en la mito kolektiv-

eco estas ja acefala, nepensanta maso. La dua estas, ke la "popolo" konsistas el individuoj. Do, ekde la momento kiam ĉiu homo scios regi sin, la socio spontanee scios, ankaŭ sen leĝoj, harmoniiĝi. Georges Ripert ankaŭ diris: "La homo kiu vivas sub la premo de la leĝoj, senkonscie akiras animon de sklavo". Ni, la instruistoj, la gepatroj, eble havas la devon, ne regi, sed gvidi la mensojn de la nova generacio por ke tiuj mensoj ne brutiĝu en la modernaj formoj de sklaveco, kie, inter aliaj, estas la televizio.

***Tereza :***

### *Ĉu televizio kiel lango de Ezopo la plej bona - aŭ malbonaĵo?*

*Eĉ se tiu ĉi temo ofte pensigis kaj diskutigis min, mi ĝojas esti la lasta de tiu ĉenletero por profiti la ideojn de la aliaj, por mia unua partopreno. Plie la saman tagon kiam oni informis min pri la temo, "Radio Libertaire" (Liberecana) elsendis debaton de la "liberpensuloj" pri tiu temo.*

*Kiel Garolo, mi opinias ke la homoj kulpas. Sed la homoj ne estas perfektaj. Same estas por alkoholo, nutraĵo, tabako, sukeraĵoj... Do kiam la tento estas submane! Iri la kinejon jam postulas monon, tempon kaj eliri el la domo. Televidon oni lumigas por iom da tempo kaj fine ĝi voras tutan tempon liberan. Mi bonŝancas fari ion samtempe : gladado, skribado, flikado... Tamen mi preferus radion por certaj debatoj.*

*Malgraŭ ĉio, ju pli longiĝas la horaroj kaj multnombras la ĉenoj, des pli oni povas vidi taŭgan elsendon eĉ valoran. Do tento! ĉefe kiam oni estas laca. Ankaŭ magnetoskopo helpas por registri kiam elsendoj estas tro malfruaj.*

*Mirigas min la nombro de la horoj dum rigardas la junuloj. Kaj kiel eviti ke la infanoj tro longe rigardu kiam la gepatroj estas for? Plie, eĉ kiam ili estas malfruaj, elsendoj seksaj povas ŝoki ilin.*

*Sed ĉu elsendoj ne povas ankaŭ instigi pensi, naski ideojn? Certe mi jam konstatis tion. Sed mi devas konfesi malpli ol kunvenoj, kongresoj, prelegoj kaj legadoj. Por mi multaj aĵoj estas instigaj. Tamen televizio ludas apartan rolon, ĉu pro lumeco de la bildoj? Miriga estas*



*vido de uloj kaptitaj de la eta ekrano, kies lumo ŝajnas sorbi la tutan atenton kiel serpento aŭ sorĉo. Tiam reklamo, mesaĝo por havigi al si konsumantojn aŭ stultigi homojn vere efikas.*

*Ankaŭ mi esperas, ke edukado helpos la memregadon de niaj nepoj kaj pranepoj. Eble post troigado ili retrovos pli mezan vojon, elektante la bonaĵon anstataŭ la malon.*



## VORTOJ DE MALJUNULO

**valo**

Maljuna blindulo memoras pri 1936
kaj pensas pri estonteco.

*1991 08 12*

***Mi** estas en Florako. Tion mi scias. Tion mi sentas: per la aero pli malpeza, per la malvarmetaj noktoj kaj matenoj; kaj per io nedifinebla, kion mi nomas la floraka etoso.*

*Sidante sur ĝardenfotelo en la ombro de tre maljuna pirarbo aŭ de alta abio, kiun mi plantis antaŭ kvardeko da jaroj, mi flaras la odoron de tiu ĉi arbo kaj la odoron de freŝe tondita herbo. Sur apuda bedo staras rozujoj de mi plantitaj, kun belaj floroj. Mi scias, ke ili estas belaj, tion mi ne vidas, sed mi flaras la dolĉan odoron de tiuj rozoj.*

*Mi aŭdas pepojn de hirundoj kaj paseroj, fajfon de merlo, stridojn de cikadoj, trilojn de najtingalo. Mi aŭdas sur proksima ŝoseo taktan paŝadon de rajdoĉevaloj kaj, malpli agrable, bruon de motoroj. Malpli agrable ja, tamen mi ne grumblas : ĉar tio montras, ke nun multaj francaj kaj eŭropaj laboristoj posedas aŭton aŭ motorciklon. Tial mi ĝojas, kvankam mi preferas piedirantojn kun dorsosako.*

*En 1936 ili veturis bicikle aŭ, pli multope, trajne. Foririnte de la teda svarmo de la industriaj urboj, ili elvagoniĝis sur stacioj ĉe marbordo, ĉe arbaroj, ĉe montaroj.*

*Sinjoro de mi konata, riĉa etburĝo, kiu kutimis pasigi la someron trankvile, for de la amasoj, en sia bela floraka vilao, diris al mi : Nun ni estas invadataj de la "pagataj ferioj". Kia malŝata tono en tiuj du vortoj!*

*Invado jes, sed kiom simpatia!*

*Unuafoje la manlaboristoj ricevis salajrojn ne por labori, sed por ĝui dusemajnan libertempon. Tio, kun la kvardekhora laborsemajno en kvin tagoj, estis grava konkero de la laborista klaso. La sinsekvaj registaroj, eĉ la plej reakciaj, ne tuŝis al tiu konkero. Male : la du semajnoj fariĝis tri, poste kvar, poste kvin.*

*Nun oni trovas tion tute simpla, tute natura. Oni forgesas la akrajn luktojn, kiuj necesis dum la krizaj jaroj 1929-1935, por atingi tiujn rezultojn dank'al triumfo de la popolfronto. Kiu vidis la radiantajn vizaĝojn de tiuj homoj kaj de tiuj infanoj el la industriaj centroj, kiuj unuafoje malfermis la okulojn al novaj horizontoj, tiu neniam forgesos pri 1936.*

*Jes, 1936 estas memorinda dato en la historio de Francio. Sed ĝi estas nur etapo, mejloŝtono sur la vojo al progreso. Ni maljunuloj faris, kion ni povis, sed ni povis nemulte, parte pro la landlimoj, kiuj apartigas la naciojn. Restas multego farenda.*

*En niaj industriaj landoj milionoj da senlaboruloj ricevas nur tre malgrasajn vivrimedojn ; milionoj da urbaj infanoj neniam spiras sanigan aeron sur kamparo. En aliaj landoj milionoj da homoj suferas pro fakta sklaveco, mizerego, malsatego. Ni devas ilin helpi ne per vana almozo, sed per vere efika solidaro.*

*La civitanoj de riĉaj landoj devas trudi al siaj registaroj tutan rezignon pri la pezegaj militistaj elspezoj.*

*Oni ne diru, ke tiuj elspezoj estas necesaj por kontraŭi la senlaborecon. Tiaj argumentoj pruvas nur mankon je imago kaj volo. Kiam la popoloj vere volos, la fakte ruinigan armilindustrion anstataŭos fabrikado de utilaj varoj. Oni kvante produktos nutraĵojn, ne parte detruotajn "pro troabundo" (dum homoj mortas pro malsato!), sed sanige konsumotajn.*

*Oni konstruos komfortajn domojn, modernajn klinikojn, laboratoriojn, lernejojn, observatoriojn, muzeojn, teatrojn, sportejojn.*



*Oni akcelos la anstataŭigon de la homoj per maŝinoj kaj robotoj, ne, kiel nun, per sovaĝa konkurenco, kiu fine pligravigas la senlaborecon, sed por malpliigi la laborhorojn, pliigi la libertempojn. Tiujn libertempojn oni uzos por necesaj ripozo kaj distro, sed ankaŭ por plialtigi la intelektan kaj manlertecan nivelon de la popolo, per kulturado de sciencoj, artoj kaj metioj.*

*Oni edukos kuracistojn, flegistojn, vartistojn, instruistojn, sciencistojn, inĝenierojn, artistojn. Oni produktos vakcinojn kaj kuracilojn, kiuj kruele mankas en la tria mondo.*

*Oni faciligos vojaĝojn, vizitojn de protektataj naturaj parkegoj, muzeoj, historiaj monumentoj, spektakloj, koncertoj.*

*La sporto ne estu plu afero de supertrejnitaj fakuloj en malmultopaj teamoj konkurantaj antaŭ miloj da sidantaj spektantoj ; ĝi fariĝu ĉies afero, amasa korpekzercado, en kiu ĉiu laŭ sia povo fortigos siajn muskolojn, pulmojn kaj koron.*

*Longa estus la listo de la farendaĵoj. Al niaj posteuloj, la novaj kaj postvenontaj generacioj ni herede lasos gigantajn taskojn kaj grandiozajn efektivigojn. Ni ne lulu nin per iluzioj : nenio fariĝos spontane, sekve de nura deziresprimo, nek per magia bastoneto. Ĉiu akiro necesigos klopodojn, baraktojn, luktojn. Gejunuloj, ne allasu vin al dubo kaj rezigno. Konsciu, ke la vojo estos longa, peniga, sed entuziasmiga. Streĉu vian volon, kuspu la manikojn, kunpremu la pugnojn. Kuraĝe antaŭen, kun la okuloj fikse rigardantaj al la celo :*

*Bonstato kaj libero por kiom eble plej da homoj en ĉiu epoko.*

## Generalo, proletoj kaj socialismo

*1) En la lastaj tagoj de aŭgusto la Franca radio superŝutis nin per novaĵoj el Bejruto pri generalo Aun. Vi scias, tiu kristana generalo, kiu dum monatoj sendadis homojn al buĉejo. Normale : tion faras ĉiuj generaloj.*

*Poste, venkita kaj akuzita pri milita krimo, la brava generalo heroe forkuris ĝustatempe el sia komandposteno, kaj*


*oportune rifuĝis al la franca ambasado. Tie, sub protekto de la diplomatia eksterteritorieco, li estis dum dek monatoj gastigata. Supozeble, sufiĉe komforte.*

*Fine, amnestiita, li ricevis permeson eliri el Bejruto. Senprokraste la Franca registaro disponigis al li specialan aviadilon, kiu transportis lin kaj lian familion al Marsejlo. Tie, kun la statuto de politika rifuĝanto li ricevis luksan vilaon kun bela ĝardeno, ĉirkaŭ kiu trupo da armitaj policanoj zorgas pri lia sekureco.*

*Malavara, grandanima Francio!*

*2) Samtempe en Parizo, lacigite de longa vana atendado, cento da malriĉaj familioj manifestaciis por ricevi decajn loĝejojn. Ĝis tiam ili ricevis nur belajn promesojn kaj bonegan konsilon : pacience atendi. Dume ili dormu sub la pontoj.*

*3) La Franca Respubliko estas estrata de socialista prezidento kun socialista registaro.*



*Bildo el Aĝenio.*



# POEZIO DE LA ŜTONOJ

Dediĉo al mia amiko Marcelo BRUSO (por la unua paĝo de lia notlibro pri geologio).

"**Ĉu CUVIER*** ne estas la plej granda poeto de la jarcento?"

BALZAC en "Peau de chagrin" (Ŝagrino)

*Tiu ŝtonkolektisto estas revon ĉasanta,*
*Kiel vi mem, poeto, kaj en ĉi tiuj notoj*
*Li resumas poemon strangan kaj mire belan.*
*Neniu bardo konis tiun kanton misteran,*
*Antikvan, pli malnovan ol skribilo kaj liro.*
*Ĝin konservas folioj virgaj. Por ilin legi*
*Endas ilin elfosi el grundo pacience,*
*Kaj klini sin al ili kun atenta rigardo :*
*Ĉar la tempoj gravuris ĝin en la sedimentoj*
*Densaj kaj ordigitaj subtere pli daŭrontaj*
*Ol ĉiuj monumentoj de l' homo starigitaj.*

*Kiuj ĝis en la teksto legis kun tremo febra,*
*Mensoj ja ekvilibraj, cerboj kleraj kaj fortaj,*
*Posedataj de l'ordo, de la ĝoja konkero,*
*Havas en la okuloj la lumon de profetoj.*
*CUVIER al nia mondo konsternata elvokas*
*La timigan spektaklon de mondo forpasinta*
*Kun gigantaj estuloj, kiujn Sankta Johano*
*Sola en la deliro aŭdacintus imagi.*
*De l' regno de la saŭroj peza, stultaj, silentaj,*
*LAMARKO kaj DARVINO vidas elsalti lertaj*
*La kantantan alaŭdon, la ĉamon. La specio*
*Ne estas plu stabila. La vivo evoluas,*
*Fajnigas la konturojn, vivigas la kolorojn.*
*De amib' al primato, kaj de pitekantropo*
*Al inĝeniaj filoj de l' subtila Eŭropo,*
*La vivanto tragrimpas la skalon de l' valoroj,*
*Entute ĝi progresas krom kelkaj erarpaŝoj.*

---

* Prononci KUVJE

*De la mistrafaj provoj de l' natur' forviŝitaj*
*La skrupula librego gardas por ni la bildojn*
*Dum en prosperaj branĉoj, daŭre la evoluo*
*Ĉu plano ĉu hazardo, pli kaj pli supren flugas.*
*Alten de salt' al salto! Alten de mont' al monto!*
*Ĝis kie ĉu do iam sur la plej alta ŝtupo*
*Venos formo perfekta, lasta, ne varionta?*

*Fosilioj kaŝantaj en vi multajn sekretojn*
*Signoj mutaj, misteraj, signoj klaraj, konkretaj,*
*Diru la tutan veron en vi enkatenitan,*
*Montru en longa nokto de sovaĝaj praŭloj*
*La penan elvolviĝon de la individuo;*
*Kiel en kruda krio, pro emoci' pli milda,*
*Sin anoncis parolo, kaj la surdan kovadon*
*En sino de instinkto de nia konscienco.*
*Kaj vi la atestantoj de l' pasint' nin helpu*
*Eltrovi al estonto la nekonatan vojon.*
*Vane ni palpe vagas en arbaro malluma.*
*Scienco al ni montru la vojon larĝan, certan,*
*Kaj gvidu ambaŭ fratojn kun liut' kaj pioĉo*
*Al la du infinitoj : origino kaj celo.*

*LAVAL, 1918*
*traduko : VALO, 1991*

*Kiam en mia dekoka jaro mi verkis tiun poemeton en francaj aleksandroj kun rimoj, en ĝi estis kelkaj junecaj mallertaĵoj, kiujn mi poste retuŝis kaj poluris. Tiun unuan version mi montris al mia patrino. Ŝi atente ĝin legis, kaj, ĝin redonante, ŝi faris nur jenan komenton : "Kiel ateisto ci estas, mia filo!" Ŝi kisis min kaj mi sentis malgajon en ŝia rideto.*

*Kara patrino, kiom ofte ŝi malgajiĝis pro mia nefleksebla, malcedema karaktero!*

---

*Mi dankas k-don GENTE, kiu pacience sekvis mian cerbumadon, kaj efike helpis min pri kelkaj prozodiaj malfacilaĵoj.*



**VALO :**

## PRI LA AMONITOJ

Dum la lastaj jardekoj oni multe parolis kaj skribis pri la dinosaŭroj, tiuj gigantaj reptilioj kun tre malgranda cerbo, kiuj regis sur la Tero dum la sekundara erao, kaj subite malaperis. (En tiu ĉi artikolo, kiam mi uzas la vorton "subite", oni ĉiam komprenu ĝin en la senco de geologia temposkalo, en kiu jarmilionoj estas relative ne pli longaj ol sekundoj en homa vivo).

Oni proponis plurajn hipotezojn por klarigi tiun malaperon; neniu estas pruvita, la debato restas malfermita.

Ŝajne oni ne atentis pri alia problemo, nome tiu de la amonitoj, tiuj moluskoj cefalopodaj kun spirala konko, kiuj ankaŭ vivis en la sekundara erao, kaj ankaŭ malaperis.

La amonitoj havis praulojn en la primara erao, la goniatitoj. Sed en la dua erao ili invadis la marojn, grandege multobliĝis, en formoj tre diversaj kaj variemaj, tiel ke Albert GODRI* povis lirike skribi : "La Naturo, ĉiam bona, ŝajnas esti sin mem superinta en *Ammonites.*"

La diverseco kaj varieco de la amonitaj specioj estis tiaj, ke oni povas karakterizi ĉiujn tavolojn de la maraj sedimentoj en la sekundara erao per unu aŭ asocio de pluraj el tiuj specioj. La elvolviĝo de tiu multegopa familio similis al brila fajrartaĵo, kiu fine subite estingiĝis.

La belemnitoj, kiuj vivis en la sama epoko, havas ankoraŭ nun praidojn en la sepioj kaj aliaj tentaklohavaj cefalopodoj. La naŭtiloj, pli simplaformaj kuzoj de la amonitoj, aperis jam en la primara erao; ili trankvile travivis la eraojn sekundaran, terciaran kaj kvaternaran en sobra evoluado, kaj en la nunaj maroj vivas ankoraŭ naŭtiloj ne multe diferencaj de siaj primaraj praavoj.

Pri la amonitoj, nenio. Se ni ne havus la abundajn fosiliojn, ni neniam scius, ke ili iam ekzistis. Kaj ne temas pri flanka branĉeto, sed pri centra vasta fasko de subfamilioj, genroj kaj subgenroj, specioj kaj subspecioj, tiel ke la paleontologoj devas konstante revizii kaj rebaki siajn nomenklaturojn.

Kial do tiu subita kaj totala malapero? Ĉu tio ne estas mistero tiom grava kaj pripensinda kiom tiu de la dinosaŭroj? Ĉu la fakuloj ne devus ĝin serioze diskuti?

---

* Albert GAUDRY: "Les enchaînements du monde animal dans les temps géologiques" (La ĉenaroj de la animala mondo en la geologiaj tempoj)

# *LAŬTE PRI ROK-GAZET'*




Ĉu vi sukcesis eviti la du unuajn numerojn de la ROK-GAZET' ? Tiam ne fieru ! Kaj tuj riparu tiun gravan eraron vian. Plej eble rapide mendu kaj abonu ĝin ĉe:

EUROKKA
F-31450 DONNEVILLE

Jam laŭ ĝia aspekto ĝi montras ne kutiman prezenton de E-periodaĵo. Kaj ĝia enhavo estas unika.

Fakte ĝi prezentas unu el la solvoj por pluvivado de nia internacia lingvo. Jam tial ĉiu devas kunhelpi (almenaŭ abonante kontraŭ 100,00 FF jare)

Jen gazeto en esperanto, kiu rekte tuŝas la tutmondan junularon, ĉar ĝi pritraktas ties intereson: la modernaj muzikoj: roko certe, sed ne nur... ankaŭ la "malroko" !!!

Kion do vi trovos en ĉi laste eldonita numero ? Multon ajn... eĉ mian foton kaj mian adreson (...!?!...). Pli serioze vi povos tralegi :

- intervjuon de la Rozmariaj Beboj; teruraj infanoj de la Tuluza rokaro.
- prezenton de "Jen la destin'" de La Pigo; t.e. Vladimir SOROKA (SU)
- artikolon pri "Kosmo-infano" de Solo; t.e. Eduardo VARGAS (Malaga, E)
- raporton pri la kulturaj aranĝoj de la lasta kongreso de SAT-AMIKARO en Amboise; i.a. "Promenado tra la lando de Oĉjo Georges Brassens" prezentita de ESPERANTO-GIRONDE (F)
- prezenton de "Aerlumo" de Flavio FONSECA (BR) kaj



"Somera temp'" de kazaĥiaj trobadoroj; t.e. Ĵomart AMZEJEV kaj Nataŝa GERLAĤ (SU)

- raporton pri la triumfa turneo de KAJTO (NL) tra Francio.
- .../...

Tamen la plej mirinda artikolo verŝajne rakontas la preskaŭ nekredeblan historion de la sovetia rokgrupo ALIBI. Ankaŭ menciindaj kiel tre interesaj estas la muzik-terminaro de Bertilo WENNERGEN (S) kaj la rok-reto; t.e. adresaro de konatindaj homoj kun komentoj.

Se la lingvopuristoj rajtos akre kritiki unu aŭ du redaktantojn, la aliaj indulgu ilin...

***abonu...***

*Marcelo R.*

** ** ** ** ** ** ** **

## *S A T - AMIKARO '92 ?*

## EKSTERORDINARA KONGRESO EN BORDOZO !!!

De la 17a ĝis la 21a de aprilo de 1992 en Bordeaux okazos la 47a kongreso de SAT-AMIKARO. Ĝia temo estos :

**De Mozart ĝis Eurokka**
**Muziko kaj Esperanto**
**kompliceco de du internaciaj lingvoj**

Jam mi devas averti ĉiujn, ke ESPERANTO-GIRONDE preparas kongreson por aktivuloj !! Jen finfine kongreso kien la esperantistoj venos por ion fari: laborkunsidoj, internaciaj E-kursoj, manlaboroj, libroservo, videoĵurnaloj, ludoj, sportumado, astronomio, radioelsendoj, kantado, preparo de skeĉoj, kuirkurso,... ktp... ĉiu trovos okupon laŭguste.

Krome infanoj ĝuos specifan programon kun esperantistaj pedagogoj: promenadoj, rajdado, magiaĵoj, dancado... kaj kompreneble E-lernado dank'al ludoj.

## tre riĉa kultura programo

<u>Klasika koncerto</u>

*kun impona infanĥoro sub la gvidado de Jean-Yves METAYER.*
*Saskia VEEN (harpo) kaj Edward HOEPELMAN (tenoro)*

<u>Eŭska kabareto kaj gaskona balo</u>

<u>Rok-koncerto</u>

kun la ROZMARIAJ BEBOJ, SOLO kaj Daniel HOUGUET

<u>Tri prelegoj F- kaj E- lingvaj</u>

## esperantista ĝemeliĝo

inter ESPERANTO-GIRONDE kaj la EŬSKA E-GRUPO

47a KONGRESO DE SAT-AMIKARO

BORDEAUX - 17/21-APRILO-1992

MUZIKO KAJ ESPERANTO






## ENMEMIĜO AU KONFUZIĜO DE MI

***Mi ŝanĝiĝas, do mi vivas :***

*La tero vivas, ĉar ĝi estas ne kia ĝi estis antaŭ miliardoj da jaroj. Mi vivas, ĉar mi estas ne kia mi estis antaŭ tridek kvar jaroj. Vivas la urbo, kie mi loĝas, ĉar ĝi estas ne kia ĝi antaŭe estis. Ĉio vivas, ĉar ĉio ŝanĝiĝas. Ĉu vivo havas finon?*

***Mi do pensumu :***

*Mi estas, kaj ne scias kiel mi estiĝis. Ĉio en mi laŭ iaj reguloj transformiĝas. Tiuj transformiĝoj ĉiam daŭras. Antaŭe duono de mi estis en mia patrino, kaj la alia duono en mia patro. Poste, per ia kombiniĝo mi fariĝis ovaĵo en mia patrino. Mi neniel povas nun memori la enuteran vivon mian. Io devis sekve ŝovi min eksteren : mi venis en la mondon ne tia, kia la nuna Mi, sed kia senkonscia movulo ploremа kaj ridema. Jaroj pasis, ŝanĝiĝis, ĉio ŝanĝiĝis kaj ŝanĝiĝas. En mi kaj ekster mi ĉiam daŭras la ŝanĝiĝoj. Hodiaŭ mi estas konscia, ke mi nun skribas, ĉu tio ne estas la regularo de la nuna ŝtupo, unu el la ŝtupoj de la senfina ŝanĝiĝado? Mi estos alia, kaj tiam ne scios, kia mi estas. La ŝanĝiĝoj daŭras, kaj certe estos io poste, estos alia io, kio do? Tion mi ne povas scii, ĉar mi ne scias kio mi estis. Tamen mi perfekte scias unu solan aferon, kiun neniu en la mondo, per kia ajn potenco, povas rabi de mi : "Kio mi estos, tio mi ne jam estis - Kio mi estis, tio mi jam ne estos."*

*IAM MI FARIĜOS TIO, KION MI NUN NE SCIAS, ĈAR MI VIVAS.*

***Universo en Universo :***

*Ĉio ĉirkaŭ la homo estas UNIVERSO. Tiun difinon donas la homo mem. Ĉu ĉiu io en la homo estas parto de tiu universo? Ĉu la tero, aŭ alia planedo, same difinas la UNIVERSON? Ĉu la homo mem al si altrudas tiun difinon?*

*Kiom grandas la mondo, tiom enigma estas la senco*

*de UNIVERSO. Rigardante ĉirkaŭ sin, la homo rimarkas la nelimecon de siaj ĉirkaŭaĵoj. Tiuj ĉirkaŭaĵoj aperas unu al la homaj okuloj. Do, ĉirkaŭ la homo, kion la homo povas vidi, ĉio tio estas en la universo, ĉiu tio estas en si mem alia universo.*

*Parolante al mi mem, pri mia sorto, mi falis en profundan silenton. Tiam mi aŭdis ĉelon ĉe mia piedo maldekstra kriadantan : "Kiom granda nia mondo, tiu mi-ne-scias-ulo, kiu neniam movas sin de loko al loko ; ĉu mi iam povos konatiĝi kun ĉiuj miaj sammondanoj? Ĉu mi povos iam vidi ĉiujn limojn de nia mondo? Kiel senfina estas nia mondo!" Tiu diro miaĉela malfermis okulojn al mi : "Tiu ĉelo konsideras min kiel sian universon, mi konsistas el ĉio, kio ĉirkaŭas ĝin. Ankaŭ mi havas mian universon, kiu siavice havas la sian, kaj tiel plu.*

*UNU ĈIO ESTAS IO EN ALIA ĈIO KAJ TIO INFINITE.*

***GBEGLO Koffi***

**Karto de M. Bartovská :**

"Karaj amikoj, en L!90 (kiu bezonis duonjaron por veni al mi) sur la paĝo 58 s-o Luna miras, kial kristanoj estimas krucon. Tamen ne krucon, sed la krucumitan Kriston! Se li mortus sub alia mortigilo, ne temus pri kruco. Ke li "batalis" por plibonigi la homaron, tion povas neniu nei. Ke nun la homaro estas pli bona, kvankam ne perfekta, estas sendube lia merito. La krucifikso montras al ni, ke plenumadi bonon valoras eĉ tiel terure morti. Kio kompare kun lia morto estas miaj zorgoj, sendankemo de aliaj kaj simile? Ni ne rezignu en bonaj agoj."



# iom pri ekonomio kaj libereco

## 1. IOM DA HISTORIO

*Meze de la deknaŭa jarcento, sub regado de reĝo LUDOVIKO-FILIPO la unua, la vivo de la salajrataj laboruloj, en Franclando, atingis la fundon de la mizero. Tion kaŭzis plejparte la revolucio de 1848a. Tiu stato rezultis de granda eraro de la granda franca Revolucio de 1789a: ĝi blinde volis apliki la libron* **"Pri socia kontrakto"** *de ROUSSEAU (Ruso), kies socio povas formiĝi nur el egalaj izole liberaj abstraktaj homoj. Pro tio, la korporacioj*, la interhelpaj laboristaj societoj, la reguloj de la kompanorganizoj, estis konsiderataj katenoj por la libera individuo, kaj la leĝo de LE CHAPELIER (Le Ŝapelje) de la 17a de junio 1791a malpermesis ilin ĉiujn.*

*La vapormaŝino ebligis estiĝon de grandaj entreprenoj, minejoj, teks-industrio, siderurgio, forĝegejoj por ŝtalo ktp. Tiuj bezonis por funkciado arojn da tre multaj laboristoj, kio estis la komenco de Kapitalismo. Tiuj multaj laborpetantoj trovis sin tute izolitaj fronte al kelkaj grandaj entreprenistoj, kiuj povis tute libere trudi siajn volojn. La tempo estis por "liberala ekonomio", eĉ "sovaĝa ekonomio"; ĉio estis nova, oni ankoraŭ ne difinis la lud-regulojn, dum la laborpetantoj ne havis eblecon por sin defendi : striko estis delikto leĝe punebla... Oni diris : ne kontrolu, ne oponu, lasu la ekvilibrojn naturaj. Samtempe teoriuloj kiel RICARDO (Rikardo) teoriumis pri la "natura salajro", kio estas "la plej malalta salajro por ke la salajrato kaj familio ne mortu pro malsato". En tiu etoso, sub Ludoviko-Filipo la 1-a, salajratoj laboris sen ferioj 11, 12 horojn ĉiutage. Leĝo de 1841a malpermesis dungi infanojn antaŭ OK jaroj..., limigis inter 8 ĝis 12 jaroj la taglaboron al "nur" 8 horoj, kaj de 12 ĝis 16 jaroj al "nur" 12 horoj... La revolucio de 1848a limigis por la laboristoj la taglaboron al 10 horoj en Parizo kaj 11 horoj en provinco.**

*Ĉe la mastra flanko, la situacio ne estis pli morala : la fabrikaĵoj estis stabilaj, la posedantoj-entreprenistoj riskis nenion, en vero ili ekspluatis "renton de situacio", kie mono nepre ĉiam altiris monon; la filoj bezonis nur heredi de la patroj por daŭrigi la samajn produktadojn.*

*Tiu mizero estis denuncita far ĉiu flanko de la politika paletro, de reakciuloj kiel Albert de Mun, La Tour du Pin, Villermé, kaj de radikalaj revoluciuloj kiel Fourier kun ties kolektivismaj "falansteroj", Saint-Simon kun speco de kooperativa socia organizo, Proudhon, anarki-socialisto.** Sed la plej radikala el ĉiuj estis Karl MARX (Karlo Markso), kiu mem difinis sian teorion kiel sciencan, kio multe impresis al la popoloj... La ekonomia teorio de MARX baziĝas sur la nocio de "PLUSVALORO"; jen kiel ĝi grandtrajtas.*

*Li rimarkis :*

*1-e, ke ĉiu objekto rezultas el homlaboro, do ke la objekto-prezo povas esti esprimata per nura sumo de salajroj, eĉ ĝis la erco kiu surloke neniom kostas, sed elterigita entenas la laborhorojn de la ministoj;*

*2-e, ke, en la fakto, prezoj estas dupartaj: la salajroj, tio estas la parto por la salajruloj, kaj la plusvaloro, tio estas la parto por la mastro. De tio li konkludas ke la mastro ĉiam tendencos pligrandigi sian parton, la plusvaloron, koste de la salajr-*

---

* *Korporacioj, komence utilaj kaj vivaj, iĝis ŝtone progresoponantaj, kaj bezonis reformojn kiel senvivaj nocaj korpoj.*

* *Necesis atendi ĝis Napoleono la III-a nuligis la leĝon Le Chapelier, kaj ne nur permesis, sed favoris kaj helpis al starigo de mutualaj asocioj kaj de emerit-kasoj. Li konstruigis bebgardejojn, maljunulejojn, malsanulejojn por infanoj, li starigis helpfondusojn por solecaj patrinoj; kaj faris ke ekde 1864a striko ne plu estos delikto. La anarkiisma verkisto Laurent Tailhade skribis en "Maskoj kaj vizaĝoj" de 1925a tion : "La 18 jaroj de la dua imperio, ni povas hodiaŭ tion proklami, sen timo pri ia ajn demento, estis por Francland eraro de gloro kaj prospero."*

** *Proudhon malfidis tute ŝtaton, kaj skribis: "Ĉia ŝtato, kiu elprenas pli ol 10% de la enspezo de la civitanoj, estas tirana ŝtato."*

parto, de kio sekvas la fama "bronza leĝo" : la salajruloj, per la leĝo de la kapitalismo, fariĝos pli kaj pli mizeraj.*
Kaj tio aspektis vera de 1789a ĝis 1848a. (Jaro de la apero de la "**Komunista Manifesto**" de MARX.

3-e, ke, do, la alproprigo de la plusvaloro far la mastro-kapitalisto estas ŝtelo al la salajruloj;
4-e, ke estiĝos do batalo inter la "klaso" de la kapitalistoj-posedantoj kaj la "klaso" de senposedaj laboristoj-salajruloj. Tiuj lastaj devas do sin unuigi en klason de neposedantoj (proletoj), por oponi al la klaso de la posedantoj-kapitalistoj; finkonkludo : "Laboristoj senhavaj de ĉiuj nacioj unuiĝu por batalo, klason kontraŭ klaso!"
5-e, ke tiu lukto povos halti nur kiam la produktad-rimedoj estos forigitaj el la manoj de la kapitalistoj kaj fariĝos komuna posedo de la laboristoj en komunisma socio, kiu do, per sia esenco mem ne povos ne distribui al la laboristoj ĉiun eventualan plusvaloron. Kaj do, ne plu estos luktoj, kaj ekestos paradiza socio...

Sekve, ĉio fariĝis komuna en Sovetio, kaj propra posedo malaperis, grandaj havaĵoj malaperis, sed samtempe malaperis la apetito por ilin akiri...
Nun estas plene videble, ke la komunisma socio komplete fiaskis. Ĝi baziĝis sur la ĝenerala aspiro al egaleco** , heredita de la Franca Revolucio, kio estas fakte nur la ekzaltado de la envio de la mezkapabla al la plikapabla; ĝi celis egalecon, ne nur en la donitaj ŝancoj, sed ankaŭ en la distribuado; la unua estis justa, sed la dua, ne. Kiel diris RENAN, "plej granda maljusteco estas egale trakti malegalajn aferojn".

La rezulto ne malfruis : la pli kapablaj aŭ pli lertaj ne strebis al plilaboro aŭ al pli efika laboro (eĉ, se ili farus tion, la malpli kapablaj aŭ malpli rapidaj protestus: por ke oni ne levu la devigan rendimenton: tion oni vidis ĉie kaj ĉiam).

La devizo de la REVOLUCIO estis Libereco, Egaleco, Frateco, sed pro tiu strebo al fina egaleco, oni devus meti ĝendarmon malantaŭ ĉiun produktanton, por ke ĉiu same produktu kaj same lukru : egaleco ne povas kunvivi kun libereco. Tio validas ne nur por komunismo, sed por ĉiu alia direktata ekonomio, ankaŭ por la distribua ekonomio de Jacques DUBOIN;
plej terure estas ke, primitive, ĉiuj teoriuloj estis tre bonintencaj kaj vestis sin per moralo, justeco ktp; sed ankaŭ "la infero estas pavimita per bonaj intencoj". Nun oni konstatis ke la teorio de MARX pri tiu plusvaloro estas eble aplikebla nur en tute stabila ekonomia socio, kie oni fabrikas ĉiam la samajn objektojn, per la sama metodo. Komunisma socio tre similas al armea socio, kie la soldatoj estas ĉiuj egalaj, kaj kie ĉio estas programita : ĝi kondukas al milittempa ekonomio, kiu estas ekonomio de malabundo, kie oni estas devigata "distribui" la malabundajn varojn, kiujn kompreneble ĉiuj deziras, kun fiksitaj prezoj.

## 2. NUNTEMPA SITUACIO

Kontraŭe, en liberala socio, la prezo de objekto ne dependas nur de la salajroj elspezitaj por ĝin fabriki kaj de la uzinkostoj (maŝin-amortizo, pago de la oficistoj, parto por modernigi la uzinon, serĉkostoj ktp), sed ĉefe de la emo de la klientoj ĝin aĉeti je la proponita prezo, de la aliaj fabrikantoj eble pli lertaj en organizado por produkti, de la grando de la uzino : ju pli granda estas ĝi, des pli malgranda estos la parto por la oficistoj, de novaj elpensoj por fabrikado de konkurantoj. La kliento havas la ĉefan rolon.

Kion MARX ne antaŭvidis, tio estas, ke "plusvaloro" povas esti negativa, kaj ankaŭ ke ekonomio povos iĝi malstabila.
En nia mondo de senhaltaj ŝanĝoj, situaci-rentoj kvazaŭ ne plu ekzistas. Ekzemple, pintomoderna prikemia uzino validas ne multe pli ol 5 jarojn! Ĉio devas esti senĉese reviziata. Nun oni klare vidas, ke profito de entrepreno ne celas riĉigon de la entreprenisto, sed unue kaj pleje, plivalorigon de la entrepreno mem, kaj modernigon per novaj investoj kiuj ebligos ĉu produkti novajn objektojn, ĉu pli bone aŭ pli profite fabriki ilin por alfronti la konkurencon. La germana "socialisto" Helmut SCHMIDT, tiam ĉefministro, diris antaŭ kelkaj jaroj : "La profitoj de hodiaŭ estos la investoj de morgaŭ kaj la salajroj de postmorgaŭ".
Estas granda tento por la franca kartezia menso pensi ke nacia ekonomio pli bone funkcios, se altkleraj funkciuloj regos ĝin, ol se nur hazardŝajnaj merkatleĝoj. Pri tio jen kion diris Maurice ALLAIS (Nobel-premiito en 1990a) pri ekonomio en libro "**La prikapitalista imposto**" : "La nuna socio bazas sin grandparte sur stranga miksaĵo el korporaciismo kaj el kolektivismo. La mitologio proklamas, ke la atingotaj celoj estas la forigo de la privilegioj, la jura kaj morala justeco; la realo montras ke la funkciado de nia socio baziĝas sur stranga koluzio (kaŝita interkonsento) de la plutokratio, de la teknokratio kaj de la politokratio, kiu donas al minoritato eksterordinarajn povojn kaj privilegiojn."

Oni ne pripensis ke se ŝtato mem ekonomias, la faritaj eraroj estas "makroekonomiaj" kaj povas endanĝerigi la tutan ŝtatan ekonomion dum la senrespondecaj koluziintoj sin lavas la manojn...

Sed se privataj entreprenistoj eraris, ili devos pagi mem, t.e. ĉu ripari, ĉu bankroti kaj malaperi, sed tiukaze la eraroj estas "mikroekonomiaj" kaj ne malhelpas kroman progreson de la entuta socio, ĉar aliaj entreprenistoj samtempe iniciatis industriajn progresojn, kiuj multe pli ol kompensas la fiaskojn de la unuaj (kondiĉe ke la kuko estu por la entreprenistoj sufiĉe apetitveka).

Tiel, en Franclando en la jaroj 70aj, per kontrolo de la prezoj, kio estas en vero ne kontrolo sed prezdevigo, la ŝtato malebligis al la franca siderurgio fari profitonen periodo de altaj mondaj prezoj por prepari modernigon. Kiam la prezoj malaltiĝis, ĉar la siderurgio trenis kun si malmodernajn uzinojn kun altaj fabrikkostoj, ĝi tamen devis modernigi aŭ krei novajn uzinojn. Ĝi do petis helpon de la ŝtato por akiri pruntojn de la bankoj (la grandaj bankoj estis ĉiuj ŝtatbankoj), tiam, la ŝtataj teknokratoj akiris plenpovon super la siderurgiaj entreprenoj. Tiuj teknokratoj taksis mem la venontajn bezonojn de Franclando post unuigo de la siderurgiaj entreprenoj, kaj forigo de la malnovaj uzinoj. Ilia konkludo estis ke oni konstruu grandan uzinon sur Mediteraneo en FOS, kaj same grandan sur atlantika bordo en DUNKERQUE. Bedaŭrinde, baldaŭ montriĝis ke nur unu el la du estus sufiĉa, kaj tiuj uzinoj laboris duonpotence kun grandigitaj fabrikkostoj : MAKROERARO, kun traduko : pliaj impostoj.

En Germanlando, kie la ŝtato ne intervenas, la laboristoj sentas sin sur la sama ŝipo kiel la entreprenisto, kaj la sindikatoj kiuj tre zorge kontrolas la kontojn de la entrepreno senmanke postulas por la laboristoj la plej grandan porcion da profitoj, kiu ne endanĝerigas la entreprenon mem aŭ ne ĝenas ĝian disvolviĝon, t.e. ia konsentita partopreno al la regado.

Ĉe ni, tiu daŭra interveno de la ŝtato, ĉu senpere en ŝtatentreprenoj, ĉu malrekte per pli frua prezmallibero, ĉu ankoraŭ per ŝtatbankoj, kaŭzas torditan sintenon de la laboristaro kaj de la sindikatoj : ili iel sin konsideras kvazaŭ ŝtatoficistoj kaj la entrepreno estas al ili fremda; ili nenion volas scii pri la farto de la entrepreno kaj pensas ke tio estas ekskluzive la respondeco de la estro. Siaflanke la estro ne pretas malkaŝe montri siajn kontojn. Rezulte, tio kaŭzas ke, okaze de konflikto, ili defilas surstrate, vokante, rekte aŭ ne, preme al la registaro. Kompreniga ekzemplo pri tio estas la afero pri RENAULT, ŝtata aŭto-fabriko. Tiu entrepreno estis tiel malbone stirita, ke en paro da jaroj ĝiaj perdoj sumis 12 miliardojn da frankoj, pagitaj per subvencio de la ŝtato, t.e. per la aliaj entreprenoj kaj laboristoj. Tio okazis pro prokrasto de modernigo, kies sekvo estus maldungo de multaj el la plej malbone kvalifikitaj laboristoj. Kontraŭ tiu decido, la laboristoj defilis surstrate, apelaciante kontraŭ maldungo. Neniu rimarkis ke per tiu defilado eĉ ne unu plia Renault-aŭto estis vendita, ke se la modernigo ne efektiviĝus, ĉar oni ne povas senfine plialtigi la impostojn, oni devus fermi la tutan fabrikon, kaj ĉiuj laboristoj perdus sian laboron, do, ke, senkonscie ili per tiu defilo segas sian sidbranĉon... La afero estis komprenebIe tre dolora, sed des pli ke oni tro longe atendis kaj neniujn aliajn vojojn preparis por la salajruloj.

Post la tre multekostaj fiaskoj de ŝtatprojektoj kiel por ilmaŝin-industrio, kalkulindustrio, informadiko, niaj registaroj perdis iom de sia entuziasmo kaj pli malmulte intervenas. Restas tamen 2 600 000 senlaboruloj, kio estas la vera malegaleco

------
* MARX antaŭvidis absolutan plimizeriĝon de la laboruloj. La vero estas, ke necesis al la manlaboristo de 1860a 2h30 por aĉeti 1 kg da butero, 1h15 en 1900, 0h10 nuntempe (L.PAUWELS)
** "La francoj volas egalecon, kaj kiam ili ĝin ne trovas en libereco, ili volas ĝin en sklaveco." Alexis de TOCQUEVILLE (Tokvil).
Origine, la problemo pri egaleco celis egalecon por ĉiuj, nobeloj aŭ ne, nur antaŭ la leĝo. En la Respublika devizo, devige konciza, oni ne precizigis, kio kaŭzis komprendevion, ĝia iluzia postulo al tutforma egaleco, socia kaj ekonomia...

*socia... Antaŭ kelkaj jaroj oni plifruigis registare la emeritecon de 65 al 60-jaraĝo. Oni tiam pensis liberigi 5 jarajn laborlokojn, kiuj povos esti je la dispono de la senlaboruloj. Ili estis tiam malpli ol 2 milionoj : multe, sed MALPLI ol nun. Tiu eksperimento ŝajne ne sufiĉis, ĉar oni denove parolas pri disdono de labormarĝeno per aŭtoritata mallongigo de la labordaŭro. Tio certe ne pli bone sukcesos, simple, ĉar homo ne estas anstataŭebla per ia alia homo : en industrio mankas inĝenieroj kaj kvalifikitaj (metiinstruitaj) laboristoj, da kiuj nia instruorganizo ne sufiĉe "produktas". Per tiu procedo de labor-mallongigo, kiel por la frua emeriteco, oni pligravigos la deficiton de nia industrio pri kleraj laborfortoj kaj grave malhelpos ĝin, kio tradukiĝos per pliigo de senlaboreco...*

*Kion do fari ?...*

**J. MANCEAU**

*(daŭrigota)*

*************************************************************************

# ILUZIAJ REALAĴOJ

En "Laŭte!" N-ro 93 K-do Jean Dequaire (mi proponetas "Dker" ĉar Deker jam uzatas por mia alia praamiko Maurits Dekker ["La mondo ne havas atendejon"]) interese enlumigas la problemon pri ekonomie politikaj iluzio kaj realo, deziro kaj praktiko ("La iluzioj kaj la realaĵoj"). Mi esperas ke li ne ŝanĝis la idealojn kiujn li kaj mi havis kiam junaj, nome ke la de li menciitaj gravaĵoj homaj ne estas liaj, sed tiuj, bedaŭrinde, nur de la amasoj nuntempaj. Celas mi lian diron ke "gravas por ĉiuj bona administrado de la ekonomio", kiun alportu la politikistoj. Antaŭ kvindeko da jaroj li kaj mi opiniis ke la administrado de la ekonomio ne estu lasata, transdonata, al la politikistoj, ke profesiaj politikistoj ne ekzistu, ĉar ke ĉiuj homoj administru mem, kune, la ekonomion. Ni opiniis ke tuj kiam oni kreis politikistojn, ĉu partiajn, ĉu teĥnokratajn, ĉu diktatorajn, oni perdas la demokration, la povon malkrei "mizeron, senlaborecon, fuŝan ekonomion, troan ekspluatadon, ŝtelekonomion". Mi pensetas ke Johano, same kiel mi, ankoraŭ opinias tion, pro lia diro "Ankaŭ la popoloj ĝenerale ne kapablas". Mi tion pensetas, kvankam mi rimarkas ke li seniluziiĝis pri la kapablo de la popolo multe pli ol mi. Ĉu vere?

Mi ankaŭ taksas malpli bezona la uzadon de moderna teĥniko, almenaŭ en la feŭdaj kaj kapitalismaj landoj. Sciante ke ekz. la ŝtato Indonezio estas militista diktatoreco kruela, same en Novgvineo, Kalimantano (malsavante la orangutangojn pro detruo ante la arbarojn) kaj Orienttimoro kiel en la resto de la lando, mi tamen ŝatas ĝian leĝon ke la uzado de modernaj cigaredmaŝinoj ricevas tiom da imposto ke pli profitas la uzado de laboristoj (ĝenerale virinoj) en la fabrikado de cigaredoj, kaj ke tiel (intence) malpliiĝas la



senlaboreco. En Aŭstralio la farmistoj riĉiĝas uzante modernajn maŝinojn agrikulturajn dum la ŝtato devas finance subteni la senlaborulojn kiujn tiaj modernigoj kaŭzas; ĉu tio plibonas ol havi malmodernajn ilojn necesigantajn pli grandan laboristaron? Senlaboreco estas malagrablega situacio kaŭzanta mensmalsanon, nervproblemojn, karaktermisformiĝon, kaj krimadon. Kaj ŝajnas al mi ke, escepte de medicina kaj eduka pliboniĝado, la plejmulto el niaj modernaj iloj estas dezirata nur pro la reklamado ata de la kapitalistaj komercistoj. Mi pensas ke sen ĉilastaj ni vivus pli simple, samtempe savante la naturon ĉirkaŭ ni. Oni diros ke sen la kapitalisma konkurencado en ĉiuj medioj, ankaŭ la medicino ne estus tiom spertiĝinta, sed mi dubas pri tio. Kooperativejoj en Izraelio (kaj aliie) montris ke la homoj feliĉas vivante en simplaj cirkonstancoj se ĉiuj partoprenantoj egale uzas la haveblaĵojn.

Pro tiu mia koncepto mi opinias (pli ol K-do Dker) ke la "elprimitivigo" de malmoderne vivantaj popoloj kaj indiĝenoj ne estas grava necesaĵo, eĉ estas evitinda jen kaj jen. Por alveni al komunisma-anarĥiisma socio verŝajne la moderniĝo estos necesa. Sed kial ne malplirapidigi ilian "komunismiĝon", por ke ili adaptu, se volante, sian "primitivan" vivmanieron, ofte pli humanan ol la nia, laŭgrade kaj laŭparte al "nia" moderna vivmaniero, ofte pli egoisma kaj detruema? La de Johano menciitaj ekscesoj kaj diktatorecoj ĉe sendependiĝintaj popoloj "triamondaj" povas facile esti kaŭzataj de la malbonaj ekzemploj de antaŭaj koloniistoj kaj de ebloj de riĉiĝo pro nunaj kapitalistaj intrudoj.

Johano ŝajnas al mi vidi tro da neceso havi "kapablulojn" por organizi nin; laŭ mi ĉiuj homoj kapablas, aŭ devas lerni kapabli, organizi sian propran ekonomion kaj siajn ekonomiajn kaj sociajn rilatojn kun la aliaj homoj. Demokrateco kaj komunismo postulas ke ĉiuj membroj de la socio kapablu juĝi la necesajn decidojn ekonomiajn kaj sociajn. Sen tio ne ekzistas egaleco, libereco kaj frateco. Kaj moderntempe ni vidas, speciale en Usono, kiom potence kaj efike kaj eksterregistare povas sin organizi homgrupoj se ili havas klaran ideon pri efektiviĝindaĵo.

Ĉu vere Johano kredas ke anarĥiismo signifas maleston de socia organizado? Tio estus sensencaĵo, eĉ antaŭ cent jaroj, kiam la plej konataj anarĥiistaj teoriistoj verkis. Laŭ mi la malesto koncernas nur la profesiajn burokratojn, registaranojn kaj aliajn politikistojn. Kaj la ŝtataparaton regantan "demokratie" la malplimultojn. Do anarĥiismo por mi signifas ke individuoj havu la samajn rajtojn

kiel la plimultoj en la socio, ke la plejmulto ne povu regi kaj subigi (kio ofte okazas en kapitalismaj demokratioj) malplimultojn kaj individuojn. Mi kunligas tion kun komunismo, ĉar mi trovas necese ke la homoj organizu sin en komunumojn de laboristoj (= ĉiuj) kaj konsumantoj (= ĉiuj), kiuj komunumoj faru la decidojn, kune kun la aliaj komunumoj, pri la sociaj kaj ekonomiaj farendaĵoj (= la misnomo "diktatoreco de la proletaro"). La bazo estas do ke ĉiuj daŭre partoprenu en la decidado, anstataŭ per mastroj kaj politikaj balotoj lasi la decidojn al profesiaj "kapabluloj" formantaj specialan klason. Mi devas substreki ke kie mi uzis en ĉi tiu artikolo la vorton "komunismo" mi signifigis ĝin laŭ la Marks'a koncepto, certe ne laŭ la malmarksismaj ideoj kaj agoj de Lenin rezultantaj en diktatorecon de iu politika partio aŭ de iu(j) homo(j).

Marcelo Leereveld.
Aŭstralio.

P.S. Kelkfoje firmaoj klarigas ke iliaj produktoj estas "verdecaj", natursavantaj. Ankaŭ mi deziras uzi tian stampon pri "verdeco" por miaj "produktoj", la artikoloj en Esperanto en iu ajn gazeto, "Verdeco" en Esperanta senco, nome ke ili savas ne la naturon sed la internacian lingvon, ne enhavante iun ajn neologismon, iun ajn malpuraĵon ("polucion").

M.L.

---

**"RUSLANDA ESPERANTISTO"**

aperas ekde aŭgusto 1991.
Ĝi estas abonebla por 1992 ĉe UEA kontraŭ 15 guldenoj. En 1992 aperos 12 numeroj.
Adreso : Ruslanda Esperantisto
SU-620077 Sverdlovsk, 77
ab.ja. 67 USSR – CCCP

******************************

**"UNU aŭ NUL"**
**(Guy Marchand)**
**reeldonita !**

*Pro mendo de la Mondcivitanoj en Francio, SAT-Broŝurservo ĵus reeldonis la verkon de la franca pioniro de Tutmondismo.*
*Tiuokaze ĝi estis tute retajpita kaj aspektas pli bele.*
*La broŝuro, 120-paĝa, estas do denove disponebla.*
*30 FF kun afranko. Mendkodo : UN*

*********************************

**Renato LLECH WALTER**

*Okaze de la datreveno de S-ro LLECH-WALTER, S-ro Albert LEOPHONTE, socia delegito de Prezidanto Alain POHER (Franca Senato) organizis en Perpignan akceptadon. Multaj oficialuloj kaj reprezentantoj de la kulturaj societoj ĉeestis la kunvenon. La gazetaro favore raportis pri tiu amika kaj internacia renkontiĝo okaze de la datreveno de nia veterano.*



## Al Kongres'!

En la stacidomo Bruselo Norda mi alvenis akurate je la 14a21 kaj post iom longa promeno tra la stacidomo trovis la Renkontopunkton. Tie atendis min ĉarma junulino kun verda stelo sur la brusto sed neniu vorto de Esperanto sur la lango. Bone, ke mi sukcesis memori iom de la franca. Post nelonge venis ŝia ĉefo-patro-avo, kiu konfirmis, en pli facila por mi lingvo, kion mi jam iel komprenis: ke la du kompatindaj devas deĵori la tutan tagon ĉe tiu posteno sen la posta kompenso ĉeesti la kongreson mem. Al ili ni estu tre dankaj.

Ĉu mi do pluveturos sola? Ŝajnis tiel ĝis la komfortiga alveno de Ĵaklino. La vetero estis varmega, kaj mi proponis refreŝigaĵojn, sed nur Ĵaklino akceptis. Ni serĉis plurajn angulojn de la stacio kaj fine trovis trinkejon kie ni prenis teon. Tempo ne mankis - la trajno al Ottignies-Louvain-la-Neuve ekiros nur je la 15a12!

Post nia teo, ni dankas la deĵorintojn kaj trovas la trajnon por Ottignies-LLN. Ni apenaŭ eksidis, kiam amika ina voĉo salutas nin. Kimie! Ĉar mi lastfoje vidis ŝin ĉe la Londona Klubo fine de 1989 ni havas multon por priparoli. Ŝi kaj Ĵaklino pli frue ne konis unu la alian. Tempo rapide pasas, kaj subite: jen Ottignies! Haste ni eltrajniĝas. La valizo de Kimie estas, por diri la minimumon, peza, kaj mi ŝin helpas laŭ diversaj ŝtuparoj ĝis ni trovas la elirejon - neniu signo tie de SAT-kongreso, neniu spuro de Esperanto. Kion fari? Ni devas trovi la Universitatan vilaĝon Louvain-la-Neuve - jen Informejo!

"Louvain-la-Neuve? Ho, vi ĝuste maltrafis trajnon por ĝi - momenton - ha! Ĝi ne ekiros ĝis 4 minutoj post la horo, vi havas du minutojn por atingi kajon 4." Dankon, sinjorino, evidentiĝas, ke ni tro frue eliris el la trajno. Ni rekure serĉas kajon 4 laŭ diversaj ŝtuparoj. La valizo de Kimie fariĝis ankoraŭ pli peza. Vidu, jen trajno - kur kur ŝov ŝov. Jen, tio iom similias al niaj antaŭaj sidlokoj!

La interamika babilado pludaŭras senĉese. Ŝajne la peza valizo enhavas nek oron nek plumbon sed la sorobanon de Kimie. Ne ordinara sorobano* sed grandega por demonstracioj. En la lunda vespero ŝi devas prelegi pri ĝi kaj ĝia kalkulsistemo - tre bona por la cerboĉeloj. Mi demandas min ĉu oni bezonus sorobanon por komputi la pezon de la valizo.

Mi ne scias kiom longe la pluveturado daŭras, sed ŝajne la trajno haltis en iu stacio. Sed ĉu vere stacidomo? Ekzistas ja kajoj. Per ĉiam plilarĝiĝantaj okuloj ni ĉirkaŭrigardas. Tiu loko, se ĝi estas loko, ne havas nomon. Nur bildojn, tre grandajn pentraĵojn. Kaj ni ŝajne estas la solaj vivantaj estaĵoj. Iom timeme ni komencas movi niajn valizojn el la trajno sur la kajon de tiu anonima artmuzeo. Ha, jen viro: eble la veturigisto. Sinjoro! Ni

---

* sorobano = japana speco de abako

serĉas Louvain-la-Neuve!? La viro rigardas nin kvazaŭ ni estus fantomoj. Ne nur fantomoj, sed frenezaj fantomoj. "Louvain-la-Neuve? Sed ĝuste jen ĝi!" Ĉu eblas, ke ekzistas tiuj, kiuj ne scias, ke Louvain-la-Neuve ĝojposedas stacidomon kun pentraĵoj el la renesanca kaj romantika epokoj kun arboj kaj arkoj kaj belformaj homaj figuroj sen vestoj en interesaj pozoj - sed tamen stacidomon kiu neniu nomo - ĝuste *ĉar* temas pri la Louvain-la-Neuve, kompreneble! Do, fakte unu francino unu japanino kaj unu ronda viro kun stranga akcento tion ne sciis, sed nun scias.

Kune ni sukcesas navigacii preter la pentraĵoj ĝis la ĉefelirejo kaj serĉas indikilon aŭ (ni fakte ne scias kion serĉi). Unuavide, SAT kaj Esperanto estas same nevideblaj ĉi tie kiel ĉe la antaŭa stacio. Levinte malsekan fingron kontraŭ la vento, ni decidas iri dekstren. Jen kafejo ĉe la kontraŭa stratangulo - kaj vidu! Iu leviĝas de la plej proksima tablo scivoleme rigardante en nia direkto. Lia vizaĝesprimo signifas *"tiuj tri devas esti esperantistoj"* . Eble li rekonas Ĵaklinon, ĉar ŝi estas fama.

Ni interŝanĝas afablajn salutojn kaj malkovras, ke la tri-kvar sidantoj ĉe tiu tablo estas la akcepta komitato. Dankeme ni eksidas ĉe la sama tablo kaj mendas trinkaĵojn. Ni ekscias, ke ni troviĝas meze de granda zono por piedirantoj, ke la kongresa akceptejo sidas iom for, sed aŭtomobilo povos porti la pli pezajn valizojn tien. Jam iu prenas la pezan valizon de Kimie.

Kvitiginte nin kun la kelnero, ni ekstaras por la lasta etapo de la vojaĝo. Bela fontano meze de la placeto plastike prezentas gestudentojn kiuj tre serioze, tre nude kaj tre malseke studas tre malsekan libron tra la senĉesa gutaro. Mi ne sukcesas turni la paĝojn por la gejunuloj.

Mi jam direktas mian nazon al la fora Sporta Centro kiam mi aŭdas la gajan voĉon de Kimie elkrii: *Saluton, Nora!* La respondo de Nora, kun peza dorsosako kaj pli peza manvalizo, estas konsiderinde malpli afabla: "Mi estas kolera!" Ŝia sperto ŝajne similas la nian; ŝi eĉ ne sukcesis trovi la Renkontopunkton en Bruselo; ŝi tamen sukcesis trovi nin uzinte malĝustan elirejon de la stacio LLN sed ne opinias tion adekvata kompenso. Brave, ŝi ne permesas nin porti ŝian manvalizon sed tamen grumbladas laŭ la serpentumanta piedira vojo al la kongresejo.

Duonvoje, jen venas trupo da verdastelaj knabinoj el la kongresejo; unu el ili tuj ekvidas la problemoŝarĝon de Nora, per du-tri vortoj persvadas ŝin ĝin liveri al pli junaj fortoj. Mi fakte tre admiras la mensan kaj fizikan forton de tiu junulino.

Finfine, en agrabla etoso, iom malrekte, iom flankiĝante ni kuraĝe antaŭenpaŝas. Al Kongres'!

JCR



# SUR VOJO AL LA AŬSKULTO DE ESPERANTO

fare de
**Sergej Stepanow**
(daŭrigo)

En la Krasnodara Societo Esperantista ĉiam troviĝis multe da esperantaj gazetoj. Tie mi vidis tiajn, kiel La Internacia Medicina Revuo, La Internacia Pedagogia Revuo, La Orienta Revuo, kaj duonsemajna Heroldo de Esperanto.

Foje, inter trarigardataj gazetoj mi renkontis la Internacian Radio-Revuon. Mi tuj prunteprenis ĝin el de la Societo.

En la revuo mi tralegis artikolon pri tio kiel ekkonstrui la plej simplan radio-ricevilon. Se vi loĝas apud radiostacio, la artikolo klarigis, por konstruo de la ricevilo vi bezonas havi nur rulon da kupra drato, la detektilon kaj aŭskultilojn.

Unue, la amatoro devas konekti, daŭrigis la revuo, kelkajn metrojn da drato inter du arboj, kroĉinte ilin al la arbaj pintoj per ovo-formaj izoliloj.

Krome, la amatoro bezonas konekti la detektilon, la aŭskultilojn kaj pecon de drato kiel konektilon kun la tero. Por la detektilo sufiĉos uzi miniaturan pecon de kristalo galeno kaj peceton de drato.

Ĉiujn partojn de la ricevilo, plu daŭrigis la artikolo, vi metu sur iun ajn tablon. Nun la ricevilo devos ekfunkcii.

"Kiel simple", mi ekpensis post kiam mi finis legi.

En la sekvanta numero de la Internacia Radio-Revuo mi tralegis daŭrigon de la artikolo. Ĝi jam priskribis konstruon de pli perfekta ricevilo. Tamen, same simplan.

Nun, rigardante en pasintecon, mi povas aserti ke la esperanta radio-revuo kaŭzis mian sekvontan intereson pri radio. Tiam mi tiom entuziasmiĝis pri tiu nova scienco, ke venis tempo kiam mi eĉ ekdeziris memstare konstrui simplan ricevilon.

Kaj kiam poste mi vizitis radio-magazenon por aĉeti radio-partojn, la vendisto en la magazeno diris al mi:

"Nun mi povas garantii ke radio-bakterio ĉi tie jam ekinfektis vin."

Laŭ mi, per tio li volis diri, ke ekde nun mi senfine

interesiĝos pri radio. Kaj li estis prava.

Krome, al tiu interesiĝo aldoniĝis alveninta kontentiĝo. Post kiam mi muntis ĉiujn aĉetitajn partojn, mia detektora radio-ricevilo bone ekfunkciis.

Atinginte tiun unuan sukceson, mi komencis legi ĉiuspecajn librojn pri radio. Tiom multe, ke la akirita scio helpis al mi konstrui unutuban ricevilon. Por mia plezuro tiu unutuba ricevilo parolis kaj ludis muzikon pli laŭte kaj pli klare ol la detektora ricevilo.

Nun tamen, post tia longa digresio pri mia formiĝo en la kono de radio-tekniko, venis tempo por reveni al mia kurt-onda ricevilo el Rusujo.

Memoru, ke mi persiste plu pensis pri tio kiamaniere mi povus liberiĝi de la ĝena aŭtomobila bruo.

Fine mi venis al konkludo : mi devos konstrui amplifilon, kiu plifortigos la radio-signalojn antaŭ ol ili eniros en la ricevilon disde la anteno. Por tio servos la t.n. preamplifilo.

Mi esperis, ke tiamaniere mi povos liberiĝi de bruo, kiu obstrukcas mian vojon al aŭskulto de esperantaj elsendoj.La amplifilo estigos, ke la radio-signaloj, kiuj eniros en la kurt-ondan ricevilon, fariĝos pli fortaj ol la bruo, kaj tiamaniere ili maskos ĝin.

Do, por konstrui tian preamplifilon mi aĉetis antikvan, jam uzitan ricevilon, kiu ankoraŭ aplikis radio-tubojn. (Kiel regulo, la modernaj radio-riceviloj uzas transistorojn anstataŭ radio-tuboj.)

Mi forĵetis ĉiujn nebezonatajn partojn el la uzita ricevilo. Fakte, el ĝiaj kvin tuboj mi bezonis nur du. Unu tubon mi bezonis por la preamplifilo kaj unu por provizi ĝin per kontinua kurento.

Mi ankaŭ ĉirkaŭvindis du kurtondajn bobenojn sur cilindroj el plasto.

Ĉiujn partojn por la preamplifilo mi muntis sur ĉasio de la uzita ricevilo, konforme al la cirkvito. Ĝian cirkviton mi trovis en iu el miaj radio-libroj.

Kaj jen, kun la vibranta koro, mi konektis la preamplifilon inter la rusa kurtonda ricevilo kaj la anteno.

"Nun, mi pensis, venis tempo kiam mi ekaŭdos puran senbruan parolon el mia plibonigita ricevilo. Tio permesos al mi aŭskulti elsendojn en Esperanto el Ĉinujo kaj aliaj landoj."



Sed, bedaŭrinde, nenia plibonigo okazis. La preamplifilo faris nenian diferencon en kvanto da bruo. La preamplifilo simple ne funkciis. Kaj neniaj miaj penoj devigis ĝin ekfunkcii.

Nuntempe mi komprenas, ke mia tiama kono de radiotekniko ne sufiĉis por trovi en ĝi eraron.

Post tiu fiasko, mi komencis studi librojn pri la transistoroj, ĉar la epoko de radio-tuboj jam forpasis. Mi ankaŭ esperis, profundiĝante en radio-teorion, trovi rimedon por solvi la problemon de la bruo.

Sed okaze, pasante en la urbo, mi ekvidis en magazeno kurtondan, t.n. komunikaĵan radio-ricevilon. Ĝi prezentis la lastan vorton de kurtonda tekniko. Sur frunto de la ricevilo, dekstre, vidiĝis la regulilo, kiu aŭtomate limigas la bruon.

"Ĉi tie troviĝas tio, kion mi serĉis tiel longe, mi pensis. Mi ne plu bezonos rompi la kapon pri la problemo de la bruo. Iu jam solvis ĝin. La inventisto enkorpigis ĝin en ĉi tiun ricevilon. Aĉetu ĝin kaj forgesu pri via preamplifilo."

Bedaŭrinde, la prezo de la ricevilo iom fortimigis min. Kvar centoj da dolaroj. Tiom multe da mono mi ne havis. Do, unue mi devas kolekti la monon.

Longe mi kolektis ĝin por aĉeti la ricevilon. Tamen fine mi ĝin aĉetis.

"Kiel bela estas la ricevilo", diris mia edzino. "Jes, tre bela", mi konsentis.

Sed neniu el ni sciis kia elreviĝo nun atendis nin. Enŝaltinte la ricevilon, mi trovis, ke ĝia bruregulilo nur softigas la tutan laŭtecon de la ricevado. Ĝi ne ekskludas la bruon. La impertinenta bruo persistis ĉeesti.

Tio faris la aŭskulton de la kurtondaj radio-stacioj preskaŭ neebla.

Kun tre trista emocio iris mi al mia lito en tiu nokto.

"Mi disipis mian monon", pensis mi turniĝante de flanko al flanko en la lito. Kaj aldone al la tristo, daŭra sendormeco elvokis hemikranion en mia kapo.

Iel, poste, mi hazarde renkontis unu el miaj konatoj, kiu ankaŭ loĝis en Melburno sed lontane de la aŭtomobila trafiko. Mi rakontis al li pri tiu impertinenta bruo.

"Por aŭskulti radio-elsendojn en Esperanto vi devas vendi vian domon", li konsilis al mi. "Aĉetu alian domon for de la urba trafiko."

Sed tiun eksterordinaran ideon mi eĉ ne riskis konsideri.

Tial, anstataŭ la revo pri aŭskulto de Esperanto, al mi restis nur iu amara sento. Ĝi similis al morna oceana ondo, kiu disbatiĝis sur roko, pelate de senkompata vento.

Intertempe mi daŭrigis lerni la teorion de la transistoroj. Post longa studo, mi fine riskis konstrui la preamplifilon, uzante ĉi-foje la transistoron. Por akiri kiel eble plej fortan signalon, mi enmetis en la preamplifilon tre potencan transistoron.

Sed, neatendite, post kiam mi enŝaltis la preamplifilon, la transistoro ekeksplodis, kovrante sin per blua nubo de fumo. Alivorte, ĝi forbruliĝis en daŭro de sekundoj.

La sekvanta legado de radio-libroj klarigis al mi, ke potencaj transistoroj postulas protekton de varmodefluiloj. La defluilo estas eta skatolo el aluminio, en kiun la potenca transistoro devas esti lokita.

Do, mi aldonis tiun defluilon. En tiu ĉi kazo la transistoro ne ekbrulis, sed tamen ĝi rifuzis pliamplifi la radiosignalojn.

Tiam mi komencis eksperimenti kun pli feblaj transistoroj. Mi uzis tiun specon de ili, kiu funkcias simile al radio-tuboj.

Kaj kiam mi ekkonstruis la preamplifilon kun tiuj transistoroj la miraklo estiĝis. Post kiam mi enŝaltis la preamplifilon inter anteno kaj mia kurt-onda radio-ricevilo, la abomena bruo malaperis.

Do, nun, feliĉa, mi povas aŭskulti esperantajn elsendojn el Svisujo, kaj ĉiutagajn elsendojn el Ĉinujo.

La elsendoj el Pekino estas speciale bonvenaj, ĉar mi povas ilin aŭskulti dufoje ĉiutage, vespere kaj matene.


Kiel ĉiam tiuj elsendoj komenciĝas per bela trilo de ksilofono. Ĝin sekvas jenaj vortoj konataj de radio-aŭskultantoj :

"Parolas Pekino! Parolas Pekino! Bonan vesperon, karaj aŭskultantoj. Nun ni komencas nian elsendon en Esperanto."

Kun tiaj vortoj, finfine, post miaj multaj klopodoj, kaj danke al la miraklo de la radio, esperantaj paroloj venis ankaŭ en mian hejmon.

Fino.





# ĉies voĉo

## PRI LA ANGLA

Pri la nuntempa neceso por la teknikisto, ke li sciu la anglan skriban lingvon, mi tute konsentas kun J. DEKER. La francaj teknikaj gazetoj kaj revuoj estas pli ĝeneralaj kaj malpli multnombre prifakaj ol la usonaj. Plie, la teknikaj informoj pri novaĵoj aperas, kiam ili aperas, kun almenaŭ sesmonata prokrasto vidalvide de usonaj gazetoj kaj revuoj.

Pri la parolaj lingvoj "angla" kaj "usona", ni memoru kion diris kun humura troigo Georges Bernard SHAW: "Tiuj usonanoj, ni havas ĉion komunan kun ili, krom la lingvo!" Por mi, tio kvazaŭ tute veras. Mi lernis la klasikan londonan anglan lingvon; mi plufoje spektis la tre faman filmon "Gone with the wind" (Alportita de la vento), kaj speciale atentis la du ĉefrolojn de SCARLETT kaj CAPTAIN BUTLER, kies rolantoj estis, respektive, Vivian LEIGH, pure angla, veninta el "Actor studio", kaj Clark GABLE, pure usona el Ohio. Ĉiufoje, mi konstatis ke mi ĝissilabe ĉion komprenas el la diroj de Vivian LEIGH-SCARLETT O'HARA, kaj eĉ ne unu silabon kaptis el la respondoj de Clark GABLE-BUTLER! Kaj mia kompreno tute dronus, se ne estus skriba traduko surekrana!...

Plie, mi povas rakonti tute komikan anekdoton kiun mi persone travivis ĉefine de la milito 39-45a.

Kiel kelkaj aliaj (1 200 000), mi estis kaptita en Dunkerque en junio 1940a, kaj restis militkaptito ĝis majo 1945a. Tiam ni troviĝis sen gardistoj plu, kun angloj samtempe kiel mi kaptitaj en norda Franclando, kaj usonaj soldatoj de la armeo "PATTON", freŝe kaptitaj. Tiam okazis io eksterordinara kaj memorinda; la angloj alparolis la usonanojn kaj tiuj NE KOMPRENIS ilin!

Mi bedaŭras, la rakonto estas vera kaj Esperanto tiam ne helpis...

Cetere, mi konstatis antaŭ nelonge, per la materialo kiun disponas nun la lernantoj pri fremdaj lingvoj (humuraj libroj, magnetofono kaj sonbendoj), ke la lernado ekzemple de la angla multe

progresis. Sed tio trafas la lernadon de la parolata angla. La skriban anglan lingvon la komercistoj kaj la teknikistoj nuntempe nepre bezonas, kaj tio reprezentas eble 30 ĝis 40% de la lernantoj, sed la parolan lingvon bezonas tiuj, kiuj iros al Usono, kaj tio reduktiĝas al 3 ĝis 5% de la lernantoj, kaj kia estos la helpo se ili lernis la londonan anglan kaj troviĝas en la Ustona Usono?

La lernantoj kiuj eniras en gimnazion uzos siajn akirojn post 7-10 jaroj; ĉu post dek jaroj la japana ne estos pli necesa, aŭ eble la Esperanta?

J. MANCEAU

## Kian legonton celu la esperantistaj verkistoj?

Valo trafe klasifikis la homojn rilate al Esperanto (L!94). Mi bedaŭras nur ke li uzis iom malestiman tonon por kvalifiki la kvinan kategorion, kiu verŝajne estas la plej granda.

Pli bone estus ke ni serioze pripensu kiel la aktivaj esperantistoj povus kuraĝigi ilin, por ke ili ne forlasu la movadon. Ili, laŭ mi, konsistigas la dorlotendan kategorion.

Kiaj estas la mezaj esperantistoj? Malfacila demando! Certe estas, ke Esperanto en si mem ne estas celo por ili. Malmultaj estas la privilegiuloj kiuj kaptas la unikan ŝancon, kiun proponas Esperanto por disvolvi sian spiritan vivon. Tamen, ni ne lulu nin en revoj kaj ne esperu ke ĉiuj esperantistoj finlernos la lingvon. Meza scipovo, kun malgranda vorttrezoro, jam estas kontentiga rezulto.

Ni do devas doni al tiu kvina klaso la emon kaj la eblecojn paroli, skribi kaj legi.

Paroligi ilin estas problemo, kiun mi ne pritraktos tie ĉi. Ĝi apartenas al la instruistrondo. Dezirinde tamen estas ke ni almenaŭ provu mal-ra-pi-de kaj kla-re pa-ro-li tiel ke oni facile komprenu nin.

Skribigi ilin. Estas necese ke la lernantoj tiom frue kiom eble konatiĝu kun leterkorespondantoj el la tuta mondo. Tio devigas ilin skribe esprimi siajn pensojn kaj vekos ĉe ili bezonon al Esperanto.

Legigi ilin. Tiu lasta punkto permesas al mi ekrajdi sur mia amata ĉevalineto. Tie ĉi kuŝas la respondecoj de la verkistoj kaj de la eldonejoj. Kiaj libroj indas esti eldonitaj:tiaj, kiuj plezurige povas esti legataj kaj komprenataj de ĉiuj esperantistoj kiuj atingis mezan scipovon de la lingvo. Tiel verki estas efike labori por progreso de Esperanto. Evitende estas verki por montri ke oni tiom perfekte regas la lingvon, ke oni estas kapabla uzi ĝin ĝis ĝiaj plej kaŝitaj rimedoj. La lingvistaj harfendaĵoj ne rajtas partopreni en la esperantista festeno.

La tradukantoj, kiuj sengloraj laboristoj, povus doni gravan impulson al la praktikado de la legado. En ĉiuj naciaj literaturoj pli-malpli regule aperas furoraj libroj kiuj ĝuas efikan reklamon en ĉiuj amaskomunikiloj. Ĉu ne estus eble, ke kelkaj tradukantoj, kunlaborante, rapide esperantigu tiajn verkaĵojn, eĉ antaŭ ol ili estas tradukitaj en aliajn naciajn lingvojn? Ĉu niaj eldonejoj farus la pruvon de sia oportunismo, profitante de la jam ekzistanta reklamo kaj aperigante la esperantigitajn versiojn tiom rapide kiom eble? Ankaŭ en tia kazo, la principoj de simpleco, kiujn mi varme pritraktadas, restas oportunaj.

Zamenhof laŭdegis simplan stilon. Ni respektu lian volon. Tio povos nur plibonigi la sanon de nia komunumo.

**Henri CASTIAU**

## ANTAŬEN AL ABUNDO POR ĈIUJ

Mi tre ŝatis la artikolon de O.P., titolitan"La disdona ekonomio, la ekonomiaj doktrinoj, kiel progresadi?". Tiu artikolo estas tre valora, ĉar ĝi montras strebon redakti ion tre pripensitan, tre ellaboritan, kun referencoj. Tio kontrastas kun la artikoloj pure propagandaj por naciismo sen ekonomiaj konsideroj. Mi parolos aliloke pri tiuj lastaj artikoloj por denove refuti la erarajn asertojn kaj prezenti alian vojon.

Tuj post la dua mondmilito mi legis du verkojn de J. Dûbuen : "La grande révolution qui vient" (La granda revolucio okazonta) kaj "Egalité économique" (Ekonomia egaleco), kiuj multe entuziasmigis min tiam. Mi estis iom forgesinta tiujn librojn, ĉar post la mondmilito ni konis dum pli ol 10 jaroj malabundon kaŭzatan de la milito. Krome, ekde 1947, mi foriris labori en Tria Mondo, kie ne regas abundo ankaŭ. Sed denove la verkoj de J. Dûbuen fariĝas aktualaj en Okcidenta mondo. Cetere tiu temo meritus ampleksan diskuton inter la laŭtuloj. Necesus pliprofundigi la temon kaj ekza-

meni kiel oni povus kontribui al ĝia efektivigo.

Mi ĵus relegis la du supre menciitajn verkojn, kaj ankaŭ broŝurojn, kaj kontaktis la movadon en Francio dank'al peranto de SAT por tiu fako, K-do Monier. El ĉio ĉi mi havas la impreson, ke sur la bazaj faktoj denuncitaj de Dübuen, t.e. ke pro la senĉesa progresado de sciencoj kaj teknikoj la kapitalisma sistemo estas kaduka, kaj necesas antaŭeniri, ĉiuj konsentas. Sed poste, laŭ tio kion mi legis ĝis nun, ŝajnas ke estas diversaj eblaj solvoj pri kiuj ne ĉiuj konsentas. Ĝuste la artikolo de O.P. celis antaŭeniri en tiu esplorado, helpe de la analizo de la grandaj ekonomiaj teorioj kaj de marksismo. Ne estas kontraŭdiroj inter marksismo kaj distribua ekonomio.

Mi deziras reliefigi la fakton, ke abundo ekzistas nun nur en Nord-Ameriko, Okcidenta Eŭropo, Aŭstralio, Japanio, kaj kelkaj malgrandaj landoj, ofte parte. El la tuta loĝantaro de la tero, tio koncernas apenaŭ unu miliardon da loĝantoj. La aliaj estas en vivnivelo tre malsupera, kaj ofte tre primitiva, tre malriĉa, ekzemple preskaŭ ĉiuj landoj en Afriko centra, ili estas verŝajne pli ol 4 miliardoj en tiu kazo. Do abundo koncernas unu loĝanton el kvin. Tio signifas, ke abundo ne estas por morgaŭ, por ĉiuj. La evoluo de tuta popolo estas ege malrapida, necesas pli ol jarcento, des pli longdaŭra ke la komenca nivelo estas ju pli primitiva. La mensostato evoluas paralele al la disvolvo teknika. En tiaj kondiĉoj, tute prave O.P. rimarkis, ke estos ankoraŭ longtempe malegaleco, kiu tamen povas esti limigata. Necesas ankaŭ mono kaj kapitalo, sed kiu regos ĝin, jen estas la demando. Ĉiukaze la historio de tiuj lastaj 50 jaroj pruvas, ke kapitalismo ne formortis. Verŝajne ĝi malaperos pro siaj kontraŭdiroj, kiel jam diris Marks, sed ankoraŭfoje tio postulos multe da tempo kaj da suferoj de la viktimoj. Kiel por Esperanto, iom da bonvolo de la politikistoj kaj registaroj povus multe helpi. Vidu en Francio, la "socialistema" registaro nenion faris por la laboristoj de dek jaroj. Se ili estus planizintaj la evoluon al socialismo, la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, estus jam granda paŝo antaŭen. Sed tamen ni voĉdonis por ili tiucele. Estas nia tasko kune esplori tion, kio estas farebla, kiel ni povus progresigi la socian ekonomion.

Multaj temoj restas pripensendaj. Tio estas instigilo relegi Dübuen kaj aliajn socialistajn kaj komunistajn teoriulojn por progresadi. Ne ĉion ili povis antaŭvidi, kaj ankaŭ ni ne povas, sed, ĉar ni vivas poste, nia tasko estas kontribui al antaŭenmarŝo sur



la longa vojeto de la homo, kiel diris J. Fourastié (Furastie). Eĉ reakciuloj estas legendaj, ĉar ili povas parte pravi, montri niajn erarojn kaj iluziojn... Sufiĉas legi iliajn verkojn kun kritikemo. Fakte, kio gravas, tio estas antaŭvidi la okazaĵojn kaj esti preta interveni kiam oportune, ne esti surprizata, ne resti gapanta, remaĉanta la pasintaĵojn, dum gravas ja la estonteco. Sciencoj kaj teknikoj senlace, nepre progresas kaj remodlas la mondon, la homaron. Ni estu progresemuloj, ne piaj konservativuloj.

J. DEKER

## DEBATO PRI SOCIALISMO KAJ KLASBATALO

*Mi ne partoprenas al la ĉenletero, sed eble mi povas doni mian opinion pri tio, kion demandis Garolo: Kia socialismo? Kia klasbatalo?*

*Unue, li tre pesimisme prezentas la mondan evoluon. Li kulpigas la homojn esti nekonsciaj kaj senvolaj. (Mi prefere kulpigus ilin generi sen konsidero tro da infanoj).*

*La komunismo ne "revis pri komunismo... sub diktatoreco de proletaro". Tio estas misprezento de la afero. La komunismo estus nova sociordo, granda ŝanĝo en la socia strukturo, kiu senigus kelkajn privilegiulojn de iliaj profitoj, do la nova povo devus esti rigora dum kelka tempo por malpermesi iliajn agresojn. La teoriuloj nomis tion proletara diktaturo. Tio ne signifis mankon de demokratio. Bedaŭrinde, ke en Sovetio estis ne diktaturo de l'proletaro sed diktaturo de unika partio kaj kruela homo.*

*Ne kontesteble, ke la kresko de kapitalismo kaj imperiismo fariĝis dank'al ekspluatado de la laboristaro. Sed la socialisma iluzio helpis la laboristojn organiziĝi kaj akiri malpli malbonajn vivkondiĉojn. Eble estis iluzio kredi ke en la tiamaj statoj de disvolviĝo oni povus starigi socialismon, sed tiu idealo kontribuis, por ke sindonemaj homoj batalu por plibonigi la homan vivkondiĉon. Eble ili ne sufiĉe atentis, ke progreso de sciencoj, teknikoj, uzo de energi-fontoj ankaŭ ebligas tiun progreson.*

*Garolo bedaŭras dezertigon de la kamparo kaj amasiĝon en urbegoj. Ankaŭ mi opinias, ke la malo estas dezirinda. La vivo en kamparo por bona uzo de la modernaj iloroj postulas novan organizadon de la laboro, sed male ol celi ĉiam pli grandan enspezon, eble estus pli bone grupiĝi en produktada kolektivo, en kiu ĉiu plenumu apartan taskon por diversigi la produktadon, tiel uzante ĉiujn eblaĵojn por loke kontentigi kiel eble plej da bezonaĵoj kaj nutri pli da lokanoj. Tio estas la ĉefa celo de agrokulturo. Tiel la agrokulturo bezonos pli da laboristoj kaj malpliigus la senlaborecon. Pli bone uzi la modernajn ilojn por malpliigi la penon, disponi liberan tempon, ol por postuli ĉiam pli da enspezo. Ankaŭ la mensa stato devus iom ŝanĝiĝi kaj ne konsideri la kamparan laboron kiel malsuperan.*

*La rimarko de Garolo pri la evoluo de la proporcioj da homoj okupataj en diversaj sektoroj de aktivado signifas ke multe evoluis, ŝanĝiĝis la maniero produkti la homajn necesaĵojn. Unue ili devis individue aŭ etgrupe produkti ĉion, kion ili bezonis, tio postulis la tutan tempon. Sed, inventante ilojn, armilojn, kultivadon, bredadon, iom post iom ili perfektigis la produktadan manieron. Ili komprenis la avantaĝon apartigi taskojn, kolektive produkti kaj poste disdoni la produktitaĵojn. Baldaŭ ne plu necesis la tuta tempo por produkti ĉiujn necesaĵojn, ili disponis tempon por produkti ankaŭ agrablaĵojn aŭ por libera tempo. La homgrupoj, kiuj bone organiziĝis, progresis pli rapide. Se nun necesas malpli da laboristoj por produkti ĉiujn necesaĵojn, tio signifas ke la homoj atingas grandan teknikan progreson. Bedaŭrinde tio, kio devus feliĉigi la homojn, okazigas ke parto el ili estas forĵetita de ia ajn aktivado, fariĝas helpatoj aŭ eĉ senhavuloj. Ankaŭ parto de la riĉofontoj estas malŝparata por bagateloj aŭ interbataloj, aŭ cele al grandaj profitoj. Oni ne sufiĉe atentas ŝpari la riĉofontojn aŭ oni poluas la naturon.*

*Pri sociala justo Garolo trafe atentigas, ke por "ĝui niajn sociajn rajtojn de homoj ni devas plenumi niajn homajn devojn de individuoj". Sed en la nuna socia strukturo, ĉu ne estas sociale justa, ke la senhava individuo, kiu malbonŝance ne trovas dungon, ricevu parton de la abunde produktitaj varoj? Ankaŭ la maljunuloj, infanoj, malsanuloj, kripluloj? Ĉu certigi al ili enspezon ne estas sociala justo? Ĉu ne konvenus pli juste dispartigi taskojn kaj enspezojn? Mi diras "juste", ĉar en la nuno necesas daŭrigi diferencojn por stimuli la produktantojn. Malfacilas trovi bonan solvon. Oni devus ĝin pripensi, esperebl eliri el egoisma individuismo, subteni movadon, kiu agas por "sociala justo".*

*Kiel oni povus nomi la celon atingindan? Malgraŭ ĉiuj malbonaj agoj de fiħomoj, kiuj pretendis esti socialistoj, mi opinias, ke la socialistoj, kiuj unue uzis tiun vorton, esperis, celis konstrui pli egalecan socion de paco, libereco, solidaro. Ni same celas, do povas plu uzi tiun vorton. Pri la klasbatalo eble ili tro simpligis la aferon. La socio ne tute evoluis kiel ili antaŭvidis. Ĉiu klaso konsistas el personoj, kiuj ne havas samajn interesojn. Eble estus preferinde paroli pri unuiĝo ne de ĉiuj, kiuj deziras ĉiam pli da avantaĝoj, sed de tiuj kiuj batalas por pli egaleca kaj frateca socio.*

*Pri S.A.T. mi diris mian opinion en letero al junularo. Tio ne signifas, ke SAT ne celos faciligi la rilatojn de ĉiuj homoj aŭ organizoj, kiuj agadas por plibonigi la vivon de ĉiuj malfavoratoj, por la socialaj progresoj, kontraŭ ĉiuj egoismoj klanaj, profesiaj, lokaj, naciaj, por strukturigi socion cele al vivo en libereco, bonstato, frateco, paco. Laŭ mi, ankaŭ por komprenigi al ĉiuj popoloj la neceson de internacia juro, kiu certigos la liberon de ĉiu popolo sin libere administri, sed samtempe devige respekti liberon de aliaj popoloj. Institucio demokrate elektota devus respektigi tiun internacian juron. Bonas havi sennaciecan spiriton, sed tio ne sufiĉas.*

*En la monda evoluo estas bonaj kaj malbonaj aferoj ; en sciencaj, teknikaj konoj estis grandaj suk-*

*cesoj. Bedaŭrinde, en organizado de la socia strukturo estas grandaj mankoj. Ĉu la Garola maniero prezenti la aferon ne estas malkuraĝiga? Ĉu ĝi ne riskas, ke oni sin demandu kial vane klopodi por ion ŝanĝi, kaj anstataŭ agadi kun la bonvolaj homoj, rifuĝi en individuisman egoismon? Eĉ se oni devas klarvide konsideri la realon, estas bone ke homoj agados kaj espereble trovos bonajn solvojn por la tuta homaro.*

*Jopo.*

SE PAROLI, PAROLU TARZANESKE!

(Kelkaj lingvaj komentoj pri la enhavo de LAŬTE! 95)

En la eseo de Igoro el Rusio aperas Tarzaneska konstruo, kiu certe ne riĉigas Esperanton: "Se konsideri..."(p.8ª), "Se paroli precize..."(p.9ª).Nu...

Se veni Tarzano,
jen estas liano!

Se paroli kun precizo,
jen la Tarzaneska skizo!

Ĝuste estas: Se oni konsideras. Por paroli precize.

Kaj Pako, sur p.16ª: "Se ne diri" "Se eki per la komenco", nu...

Se ne diri Tarzano,
eble diri Pak-ano!

Se per la komenco eki,
Tarzano preferi feki!

Ĝuste estas: Por ne diri. Por eki per la komenco.

***

(p.11ª) Ja strangas multe tio:
Igoro el Rusio
parolas pri monaĥo,
sed nomas lin Monako! (*)

(*) Nomo de Mediteranea haven-urbo!

(p.20ª, lin.1ª) sendomaĝa (ne temas pri bedaŭro, sed pri io sendifekta, nome: sendamaĝa!

***

(p.39ª) PRI JORGO
Estas alvoko de JORGO,
farita kun granda zorgo:
ĉu por danci aŭ muziki
vi nur devos vin apliki!



(p.41ª) PRI SERGEJO STEPANOVO
Ne trafis li la partan eron,
sed fine solvis la aferon
por konversadi Esperante
per la radio ricevante!

Sur p.40ª verkas Marselo PISTOLESO pri: KARA ARBO. Jen mallonga pastiĉo laŭ lia "stilo".

CARAJ ARBOJ (celantaj la stilon de Marcelo PICOLECO)

La cinika carino Cecila havis rozecajn cicojn, sed pro sia cetaca dikeco, certe ne similis al gracia cigno nek al cizelita cicindelo. Ĉar la cecemuŝoj, cimoj kaj cikadoj ciciume agacis ŝin, kun la celo senagaciĝi en tia cirkonstanco,Cecila ĉesis desegni cirklojn,flankenmetis la cirkelon kaj decidis iri en la cirkon, por aŭskulti ludadon de citroj kaj cimbaloj, laŭ anonceto en la cirkulero ricevita de ŝia edzo, la caro Cicerono en la Civila Registrejo de l'civito,en la momento kiam li gustumis sukerecan citronsukon kun cinamo,rigardante la cirkuladon de biciklantoj sub la ombro de du vicoj da cipresoj kaj cedroj de apuda placo cara (nome, de li mem, la caro Cicerono).
La cinika carino Cecila precize sciiĝis pri la unikeco de l'cirka spektaklo laŭ la citita cirkulero.
En la cirka placo, ciganoj kun cikatroj fumis cigarojn, kiam la cinika carino Cecila, kiu havis rozecajn cicojn, preteriris la carajn arbojn (cipresojn k cedrojn) de la placo cara, kaj pacience sukcesis atingi la cirkotendon,spite sian cetacan dikecon kiu obstrukcis ŝian marŝadon.
Sciantoj, same kiel scienculoj,scias ke nur kun pacienco venas scienco, kaj tial ili scias ke la cinika carino Cecila, kun la celo sen-cici-umiĝi, sukcese atingis la cirkotendon, spite sian cetacan dikecon, nur dank' al sia celtrafa pacienco.
Gratulon al la sciantoj kaj al la cinika carino Cecila kiu en la cirko sukcesis sen-cici-umiĝi de tiuspeca cici-umado, nome,de la ciciado de ceceoj, cimoj kaj cikadoj, per aŭskulto de citroj kaj cimbaloj!

Ergoto de Bonaero

# EKFLUGO

*De kiom da tempo ŝi estis en tiu kabineto pri radiologio? Kvin, dudek minutoj, unu horo? Por ŝi : senefemera eterneco. Kiam do tiu atendo finiĝos? Ŝi kuraĝe strebis por resti trankvila kaj pensi pri agrablaĵoj : sunleviĝo sur monto, asfodelbukedo, rideto de amiko. Kial nun ne reciti poemon, ekzemple ĉi tiun de Phil Bosman? :*

"Miaj okuloj estas por la lumo,
por la verdo de l'printempo, por la blanko de la neĝo,
por la bluo de l'ĉielo, por la steloj en la nokto.
Mia buŝo estas por la vorto, por ĉiu bona vorto,
al kiu sopiras aliulo.
Miaj lipoj estas por la kiso
kaj miaj manoj por dolĉeco, tenereco,
por konsolo, kaj por pano al la malriĉulo.
Mia koro estas por la amo, por la varmo..."

*kaj poste? Ŝi vane serĉis la finon de la teksto. Ŝi eknervoziĝis, petis helpon al la muroj ; sed ili estis tro blankaj, anonimaj por akcepti revojn. Tiam ŝia volo moliĝis, kvazaŭ iu nekonata eklogus en ŝia kapo kaj ordonus al ŝia menso. Ŝi havis la strangan impreson vivi sur alia planedo malamika, kie ŝi retrovis... la TIMON.*

"Ĉu vi scias kiel gustas la timo? Iel sale, sed ne kiel salo. Ĝi estas stranga frosto, kiu vekiĝas en viaj internaĵoj kaj tremigas ilin ; tra la spino, migras miriapodo kun frostaj piedoj, disungiĝas al la koro kaj tuŝas ĝin. Kaj subite ĝi malaperas, sed post momento, la frosto denove eniras, viaj manoj humidiĝas kaj tremas..."
(El la libro : **Romeo, Julieta kaj la tenebro**)

*Ĉio komenciĝis antaŭ dek kvin tagoj, per akrega doloro je la dekstra flanko, ĉirkaŭ la hepato. Unue ŝi ne donis atenton pri tiu malordaĵo. Poste, ŝi eksentis ĝin kiel venenan mordon kaj la timo, kun pacienco kaj obstino gvatis la plej etan senfortiĝon, finfine trovis fendeton kaj senĝene nestiĝis en la korpo de la malfeliĉulino.*



*Tiu fendeto estis la "ekflugo" de ŝiaj du filoj, ekflugo, kiu igis ŝin vundebla kaj fragila. Ŝi diligente prepariĝis al tiu grava evento. Tamen la skuo estis forta kaj senĉese pluvis en ŝia korpo, en ŝia koro. De dudek jaroj, ŝi vivis en harmonia osmozo kun la filoj, kiujn ŝi estus deziranta protekti en sia amveziko. Ŝi ofte pensis pri poemeto, dediĉita al ili, kiuj malfermis por ŝi la pordojn de magia spaco :*

"Pli pura ol la pura lumo,
Pli bela ol la brila stelo,
Pli granda ol la vasta maro,
Pli konsola ol la suno de l'esper',
Tia estas mia amo por vi..."

*Antaŭ du semajnoj, venis la tempo tranĉi la umbilikan ŝnuron. Kia doloriga momento! Ĉar ŝiaj infanoj estis la aero, kiun ŝi spiras, post ilia foriro ŝi sufokiĝis. La timo elektis tiun favoran periodon por penetri en ŝian eston. Terura timo, kiu iom post iom skrapis ŝian karnon, suĉis sian sangon, nebuligis ŝiajn pensojn ; ŝi ne plu vidis la sunon : ĉio estis griza kaj sengusta. Ŝi havis la ege malagrablan impreson, dum pluraj tagoj, gliti sur krutega vojo, kiu iras al abismo. Tiam, en fulmo de klarvideco, ŝi komprenis, ke la savado venus nur de **ŝi mem**. Ŝi devis reagi, ŝi devis liberiĝi de la teniloj de polpo. Ho rapide haltigi tiun riskan falon! Iom post iom, lumeto ekbrilis en ŝia kapo : ŝi konsciis pri sia rezervo da fortoj, kiujn ŝi kredis malaperintaj ; fakte ili nur dormis ; ŝi nepre devis veki ilin per pozitivaj pensoj. Ŝi **povas** tion, ŝi **sukcesos!** Tiam, kun energio simila al mil sunoj, ŝi alkroĉiĝis al la radikoj de la volo kaj de l'espero. Subite, la grundo fariĝis pli stabila sub ŝiaj piedoj. Ekde nun ŝi certis, ke ŝi estis gajninta la lukton kontraŭ la timo...*

*La kuracisto, enirante en la atendĉambron, trovis ŝin perdita en siaj rememoroj. Lia ĝojiga rideto estis por ŝi kiel rozĝardeno brilanta pro roso. Tuj nova vivo inundis ŝin kiel mirakla fontakvo. De ŝia*

*tuta esto ĉiu ĉelo ekvibris. Ŝi estis kiel princino, kiu tuj retrovos sian Ĉarman Princon. Haste ŝi eliris : hele bluis la ĉielkupolo, mirinde printempis en ŝia bela urbo. Ŝi sentis sin preta por alia vivo, kun la mano en la mano de sia kunulo. Tiam ŝia ĝojo, kiel birdo, ekflugis al la firmamento. Ŝi ege deziris tranĉi tiun magian scenon kaj sendi ĝin al vi, kara leganto, por ke vi dividu tiun vivigan plezuron. Imagu! Malfermi tiun paketon kaj malkovri muzikan ĝojon meze de opala ĉielloketo, kun rebriloj de vitraloj...*

***Michèle FREUD***

## ROLO DE L'VIRINARO

Probable laŭtulinoj koleretos kontraŭ mi pro tio, kion mi skribas en ĉi tiu artikoleto. Sed tio, kio sekvas, estas miaj ideoj, mia "vero", tial mi petas toleremon.

Virinoj similas al floroj en forcejo. Dum floroj troviĝas tie, ili kreskas fortaj kaj belaj, sed ekster la forcejo ili tuj velkas.

Dum jarmiloj virinoj vivis submetitaj al la viro - ĉar ĉi tiu fizike pli forta - plenumante patrinecan kaj hejmecan taskojn.

Sed en la nomataj civilizitaj landoj virinoj povis liberiĝi el tio kaj montri ĉiujn kapablojn kuŝantajn en ili.

Civilizo estas iu speco de forcejo.

Tamen estas necese fari jenan klarigon. Virino, kun la sama kapablo kiel viro, povas stiri aŭtomobilon, supersonan aviadilon, esti kapitanino de ŝipo k.c. Sed la kreinto de aŭtomobiloj, supersonaj aviadiloj, vaporŝipoj kaj ĉiuj mirindaĵoj, kiujn ni ĝuas, estis la viro.

Unu afero estas uzi aĵojn kaj ilojn, kaj alia afero krei, inventi ilin.

Ĉiam, tra la epokoj, kiam viroj virinaĉiĝis kaj virinoj viraĉiĝis, komenciĝis dekadenco. La ĉina filozofo Konfuceo (551-479 a.K.) esprimis : "Kiam en la mateno klukas la kokino anstataŭ kokeriki la koko, tio signas la finon de regno." (Laŭtulinoj, bonvolu ne kolereti kontraŭ mi, ĉar mi naskiĝis el virino kaj havis edzinon, kiun mi multe amis).

Virinoj, estu do modestaj, ĉar spite ĉion via ĉefa tasko ne ŝanĝiĝis. Vi devas krei la novan karnon, kiu anstataŭos la jam

fino sur p.54



## INFORMOJ PRI LA "POSTREVOLUCIA" SITUACIO DE LA HUNGARA ETNA MINORITATO EN TRANSILVANIO

Mi mem vidis, ke en la centra hungara urbo Kolozsvár (Koloĵvar), la nomoj de ĉiuj stratoj estas skribitaj nur en rumana lingvo, kaj eĉ la vendejoj ne havas hungarajn surskribaĵojn. La rumana loka registaro rompis la ŝlosilon de la fermita ejo de la Hungara Muzea Asocio, tute neŭtrala, scienca organizaĵo, kaj forĵetis el ĝi la trovitajn valoraĵojn : librojn, presaĵojn, "donacante" la ejon al rumana familio veninta de Bukareŝto, la malproksima ĉefurbo de Rumanio. Same, la finna lektorino perdis sian loĝejon en Kolozsvár, kiam ŝi pasigis sian someran libertempon hejme, en Finnlando. Ŝi estas membro de la hungara fako de la universitato, eble tio klarigas ĉi tiun aferon!

Kiam ni veturas tra la preskaŭ centprocente hungara pejzaĝo de Kalotaszeg (Kalotaseg), proksime al Kalozsvár, tiam oni trovas nur rumanajn nomojn de la vilaĝetoj! Multloke mankas eĉ la rumana nomo! La hungaroj ŝanĝis la rumanan nomon al la originala hungara, sed tion la rumana registaro ne volas elteni, tial deprenas la hungaran nomon. La rezulto estas por la vizitantoj, ke tute ne eblas orientiĝi. En la malgranda vilaĝo Oltszakadár (Oltsakadar), proksime al urbo Nagyszeben (Naĝseben) ĝis nun funkciis bazlernejo en hungara lingvo por la kvin infanoj loĝantaj en ĉi tiu vilaĝeto. Nun somere ekestis la nova leĝo, ke nur por minimume sep infanoj instrueblas en hungara lingvo. La hungara loĝantaro kun granda laboro serĉis du novajn infanojn en la ĉirkaŭaĵo. Ili decidis gastigi la du alivilaĝajn infanojn dum la lernjaro kaj tiuj gepatroj konsentis la decidon. Sed estis nur kelkaj tagoj antaŭ la komenco de la lernojaro, kiam ekestis nova leĝo : oni povas instrui la gepatran, hungaran lingvon nur por minimume ne sep, sed naŭ infanoj! La vilaĝanoj serĉis novajn infanojn, sed vane ; troviĝis nur unu, kio signifas, ke sume estis nur ok infanoj. La leĝo ne permesis instrui ilin en hungara lingvo : La ok infanoj nun devas kontraŭ sia volo lerni ne en la gepatra,

sed en la rumana lingvo!

La malnovan, pli ol 500-jaran hungaran tombejon, nomitan "Házzsongárd" (Hazĵongard), kiu servis dum la jarcentoj kiel nacia panteono, kun la tomboj de la plej grandaj hungaraj artistoj, sciencistoj, verkistoj, poetoj, ktp, "transformis" la rumana registaro al rumana tombejo per la plej brutala neniigado de la valoraj hungaraj memoraĵoj kaj ilia anstataŭado per modernaj rumanaj tomboj! Ili tiel intencas mensogi, ke en urbo Kolozsvár vivas preskaŭ nur rumanoj kaj neniam vivis tie hungaroj!

Bonvolu protesti kontraŭ la menciitaj faktoj ĉe la rumana registaro kaj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj!

Dr. Zsuzsanna Agnes Berényi
Dob u.16.II.39
H-1072 BUDAPEST, VII

---

## NASRUDIN

Nasrudin grimpis en ies ĝardenon kaj kornencis ensakigi ĉion porteblan.

Ĝardenisto alkuris : "Kion vi faras?"
"Ventego enblovis min."
"Kaj kiu elradikigis la legomojn?"
"Mi kroĉis min al ili por haltigi min."
"Kaj kial estas legomoj en la sako?"
"Tion mi scivolis kiam vi ĝenis min."

---

Najbaro petis la azenon de Nasrudin.
"Bedaŭrinde mi jam pruntedonis ĝin."
Tuj sonis heno de azeno.
"Sed, majstro, mi aŭdas ĝin en la ŝtalo."
"Al iu, kiu kredas azenon kontraŭ mi, mi pruntos nenion."

---

**fino de p.52**

eluzitan kaj elĉerpitan, por ke nia mondo daŭrigu bonorde. (Tiu "bonorde" estas dirmaniero).

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj! **A. Lopez Luna**



# FRENEZULA AFERO : LA ETNA NACIISMO

En epoko de ebleco de prospero kiel ni neniam ĝuis, en ĉi mirinda epoko, homoj revas pri reiro al Mezepoko, kiam estis feŭdoj kiuj interbatalis kronike. Kio estas etnismo, se ne rasismo, feŭdismo, dum ĉiu vivas en sia malgranda ĉirkaŭaĵo, senkonsidere al ekonomio, enmurigate en sia sankta lingvo, en netuŝeblaj reguloj diktataj de la prapatroj? Ĉio ĉi en epoko kiam interkomunikado tutmonda estas intensa, kiam oni havas la eblecon vojaĝi tra la tuta tero rapide kaj relative malmultkoste, kiam aviadilaj linioj traflugas Oceanion, ĉiudirekten, tage-nokte, ktp...

La rezulton ni vidas en Jugoslavio, post 45 jaroj da paco, da provo starigi komunismon ne krudan kiel en Sovetio, Kroatoj kaj Serboj interbatalas. Jam pli ol 400 mortintoj en kelkaj semajnoj, kiom da mortontoj morgaŭ, se eŭropaj instancoj ne sukcesos restarigi pacon? En Ulstero 20 jaroj da blinda terorismo kun kia rezulto ? Nenio, krom mortintoj kaj ruinoj. Same en Hispanio kun la vaskaj teritorioj. En Korsikio estas iom malsame, la "mafia" banditara asocio estas deziranta havi propran patrion, verŝajne sensukcese, sed "Chi lo sa?", kiu scias? Ĉiuokaze estas komprenebla celo : Korsikio fariĝus sanktejo, rifuĝejo por la banditoj, kiuj povus vivi pace en propra ŝtato. Litovio kaj aliaj landoj el Sovetio deziras sendependecon, ekonomie estus ruiniga afero, ĉar tiuj landoj havas nenian riĉofonton. Litovio ricevas gason el Ukrainio kaj petrolon el Siberio. Certe Ukrainio havas pli da riĉofontoj ol Litovio, sed se ĝi estus sendependa, ĝi sendus sian gason al centra Eŭropo pli pagipova ol Litovio. Cetere oni povus longigi tiun liston senfine. Amuza anekdoto en Polio, homoj tiel bone komprenis kapitalismon, ke oni sendis ilin en malliberejon, anstataŭ honori ilin, strange! Ĉiuokaze etna naciismo estas ekonomie ruiniga, ĉar ĉiu elemento estas malpli riĉa ol tuto.

Apostolo de tiu freneza naciismo rakontis antaŭnelonge ke ŝi ne kapablas ami la malproksimajn popolojn kaj rasojn, ŝi jam penas toleri siajn najbarojn (L! 91). Fakte neniu postulas ke ŝi amu la malproksimulojn, la fremdrasul-

ojn. Ne, tute ne. Se ŝi nur ne malamus al la najbaraj nek al malproksimaj etnoj, sufiĉus ke ŝi kapablu toleri la idiosinkraziojn de siaj samuloj, ne pli. Ĉar temas pri ununura speco : Homo sapiens, disvastigita sur la tuta tero. La koloro de la haŭto, la diversaj lingvoj estas bagatelaĵoj ne pli gravaj ol aliaj karakteroj fizikaj : granda, malgranda, dika, maldika, ktp., aŭ moralaj : laborema, mallaborema, kredema aŭ ne... Do ni forgesu tiun aferon de etnoj, rasoj, ktp., por vidi nur homojn.

Estas landoj, kie tiuj konceptoj estas praktikataj tute nature, ekzemple la franca departemento Reŭnio. Tie kunvivas homoj de diversaj etnoj kaj originoj : aziaj, afrikaj, eŭropaj, kun multe da mestizoj ĉiuspecaj. Estas nenia problemo, ili pace kunvivas ekde la naskiĝo ĝis la morto. Via instruisto povas esti : malagaso, eŭropano, hindo, ĉino, kreolo, same pri viaj lernejaj kamaradoj, via kuracisto, via komercisto, viaj najbaroj ktp. Ili ĉiuj devige parolas kaj lernas france, sed neniu malhelpas ilin paroli la kantonan, guĵerati-, urdu-lingvojn inter si; ili povas tute libere studi tiujn lingvojn ĉe universitato aŭ privataj lernejoj, aŭ tutsimple hejme. Lingvon oni povas ĉiam lerni kaj praktiki sen problemo. Mi ne komprenas, ke post 45 jaroj estas Litovoj, kiuj ne kapablas kompreni rusan lingvon, almenaŭ por la ĉiutaga uzo. Mi restis nur du jarojn en Germanio, kaj povas uzi la lingvon por ĉiutaga uzo, ne necesas koni ĉiujn deklinaciojn, nek ĉiujn vortojn tiucele.

En Maŭricio estas proksimume sama situacio, krom ke pro la brita okupado dum pli ol 150 jaroj la angla lingvo estas la ĉefa instrulingvo, ankaŭ la franca estas oficiala lingvo, sed malpli bone konata (oni ne konas sciencajn kaj teknikajn terminojn france). Sed oni parolas ĉiutage kreolan lingvon derivatan de la franca, ĝi estas eĉ pli facile komprenebla ol la kreola lingvo de Reŭnio. Nun, pro la naciista tendenco de la plimulto, ili intencas trudi "hindi" kaj aliajn orientajn lingvojn en la unuagrada lernejo. Kompreneble estas granda premo sur la lernantoj kaj kelkaj rifuzas tion. Multaj akceptas, ĉar la plej granda parto el la televidaj elsendoj estas en "hindi" kaj "hindustani". La malavantaĝo estas ke pro la premo de la lingvaj studoj, multaj lernantoj, kiuj havas talenton por sciencoj, estas forpuŝataj, kaj mankas do scienculoj kaj teknikistoj. Sed ne estas batalo inter la diversaj etnoj. Tamen estas verŝajne pli da diferencoj inter Hindoj, Ĉinoj kaj Eŭropanoj ol inter Serboj kaj Kroatoj, aŭ Hungaroj kaj Rumanoj, ktp. Same pri la religioj, en tiuj insuloj kunekzistas la tri ĉefaj religioj : kristana, islama kaj hinduista. Eĉ la islamanoj estas pacaj kaj toleremaj, ne kiel en arabaj landoj, ili lernis toleremon. Laŭ miaj konoj estas same en diversaj insuloj el Oceanio, en landoj de Sud-Ameriko, kiel Brazilio, Garolo povus eventuale certigi tion.

Ne necesas esti sennaciisto por kompreni ke tiu koncepto superas etnan naciismon, kiu kondukas nur al malamo kaj al milito, t.e. interbuĉado. Teorie oni povus koncepti paceman naciismon, sed praktike prediki malamon kaj malestimon por trovi pacon? Ĉiuj povas kunvivi kun aliuloj sen konsideri raskarakterojn. Des pli ke biologie la homoj estas ĉiuj samaj, kun tre kompleksaj biokemiaj reagoj, ankoraŭ ne ĉiuj bone konataj. Sed tio, kion oni bone konas, permesas kompreni ke iam estonte oni kapablos kuraci moralajn difektojn same kiel fizikajn. Genetiko kaj biokemio progresas grandpaŝe.

Mi esperas ke tiuj konsideroj helpos kompreni tiujn problemojn, kompreni ke oni povas vivi sen rasapartigo, sen naciismo, kiel homoj unuvorte, estas nenia subhomo inter ni.

**J. DEKER**



**LENTAIGNE :**

**IOM DA GRAMATIKO**

Pri uzo de **"sia"** (Aktoj de Akademio n°I, p.55, n°IV de la Regulo) oni legas :

*"Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata."*

Tiajn "okazojn" oni ne kutime trovas. Jen unu ekzemplo, preskaŭ raraĵo:

"Ŝi vivas en granda zorgo pro timigaj sonĝoj. Fine ŝi ricevas la sciigon pri lia morto (de la edzo). Plena de funebro kaj kordoloro ŝi naskas post du semajnoj lian kaj ŝian filon : Parsifalo." (El **Germana Antologio**, p.89)

# PRI LA MORALA LIBERECO

Laŭ ĝeneralaj difinoj, la libereco estas nocio kaj negativa kaj pozitiva, t.e. ke ĝi difiniĝas kiel la neesto de trudo fizika aŭ socia, samkiel la stato de tiu, kiu faras tion, kion li volas.

La filozofia libereco estas la kapablo sin determini sen alia motivo ol la volo mem; temas pri la libera volo. Tiu ĉi estas necesa por fondi respondecon, sed ĝi donas neniun motivon por elekti iun ajn sencon. Ĉiu libereco ne estas bona per si mem. Ĝi nepre pravigas sin rilate tion, kio estas ĝusta, vera kaj bona. Homo vere libera estas tiu, kiu alkutimiĝis al la bono, kiu tute elektis ĝin, kaj pro tio, li ne plu povus malbone agi. Tio estas la libereco de la saĝulo.

La libereco estas la plej alta kreado, ĉar ĝi estas la kreado de si mem per si mem. Pli ol elekto inter du agoj, la libereco estas teniĝo de la tuta esto, kiu permesas al tiu ĉi elekti sin mem.

La opinia kaj konscia libereco nepre estu la regulo por ĉiu homo: propra mastreco kaj mastreco pri lia farado kaj penso; malakcepto de timo kaj antaŭjuĝoj.

Rilate la religion, la liberpensulo estas tiu, kiu fidas nur la racion, agnoskas neniun dogmon. Oni difinas la liberan ekzamenon kiel la fakton akcepti kiel veron nur tion, kion la racio aŭ la sperto allasas. La framasono estas libera homo metafizike aŭ morale; li uzas la liberan ekzamenon.

La racio kontraŭstaras al la revelacia kono. La racio estas ne nur komprenkapablo sed ĝi estas ankaŭ tio, kio komprenigas, tio, kio estas komprenenda.

La racionalismo defendas la ekzistadon kaj la valoron de la racio. Ĝi kontraŭstaras al la empirismo kaj la mistikismo. Ĝi akceptas nur verojn science pruvitajn kaj deklaras, ke supozitaj konoj de la fido estas malraciaj.

La libreto **"Pri la libera ekzameno"** (A propos du libre examen) de la Racionalista Fondaĵo (Fondation Rationaliste) estas dediĉita al la majstroj de la Libera Universitato de Bruselo, kiuj antaŭe samkiel nuntempe, encerbigis al siaj studentoj la emon al la pruvo, la respekton pri la vero kaj la uzadon de la libera pensado.



En sia antaŭparolo la Racionalista Fondaĵo skribas, ke la Libera Universitato de Bruselo trudas neniun doktrinon al siaj studentoj, sed fondas sian instruadon sur nocio pri libera ekzameno, kies komunaj rilatoj estas: malamo al dogmismo, fido je la homa racio, kulto al la konscia libereco.

Aŭskultu kelkiujn el tiuj famaj majstroj.

Unue, Teodoro Verhaegen, la fondinto de l'Universitato en 1834:

*"Ĉiuj liberecoj estas trompaj sen absoluta ekzamenlibereco; tiu ĉi estas la elemento de ĉiu progreso, la necesa forto de morala kaj intelekta vivo. Nur sinceraj konvinkoj estas respektindaj; sincera estas nur tio, kio estas rezonata. Kredo rajtas, kiam ĝi estas en akordo kun racio. Homo povas taksi kaj kondamni nur tion, kion li komprenas. Ĉiu ricevu la laboron de l'inteligenteco por ekposedi la veron; ĉiu estu sufiĉe bonkora por helpi siajn samulojn sen distingi inter kultoj, naciecoj aŭ rasoj; mi deziras, ke ĉiuj prenu la vojon al perfekteco kaj savo."*

Eduardo Bogaert:

*"Libera ekzameno estas la kondutomodelo de tiu, kiu proklamas nur tion, kion li tenas kiel veran, eĉ kiam tio kontraŭstaras al la aserto de iu ajnekstera instanco."*

Paŭlo Hymans:

*"Libera ekzameno kutimas pripensi, taksi, kompari, tralegi kaj elekti librojn. Ĝi liberigas de antaŭjuĝoj, snobeco, partieco, rutino kaj konformismo."*

Maksimo Glansdorff:

*"Prefere al la spirita konkero gvidata de propagando kaj konvertado, la libera ekzameno elektas la spiritan konkordon naskiĝintan el reciprokaj kompreno kaj respekto.*

*Klare kaj universale, tia kompreno nepre ilustras la principon de la libereco de l'ideoj. Pro tio ĝi signu plej belan efikon, nome toleremon kaj bonvolon."*

En 1909 la Universitato festis la sepdekkvinjaran datrevenon de sia kreado. Dume Henriko Poincaré (kuzo de la franca Prezidento Rajmondo Poincaré) paroladis. Oni notis jenan rimarkindan frazon:

*"Neniam la penso devas submetiĝi: nek al dogmo, nek al partio, pasio, profitamo, antaŭjuĝo, nek al io ajn krom al la faktoj mem, ĉar por la penso submetiĝi estus ĉesi esti."*

En 1950 Paŭlo De Groote skribis en la Revuo de l'Universitato, ke *"oni ne devas konfuzi kontraŭklerikalan sintenon kun kontraŭreligia sinteno, ĉar iuj rigardas la religian fenomenon kiel homan manifestiĝon gravan kaj respektindan"*. Li aldiris, ke *"en la Universitato, la libera spirito, kiu ekzamenas, kaj la toleremo, nepre gvidas adoptendan pozicion rilate la veran religian penson kaj malamikan pozicion kontraŭ tiun klerikalismon, kiu posedas ĉiujn ekscesojn de religia grupo, forgesas sian spiritan rolon kaj uzas sian ruinigan prozelitismon sur la bazo de portempaj avantaĝoj."*

***

Mi demandas min, ĉu oni vere povas malkunigi kontraŭklerikalan sintenon disde kontraŭreligia sinteno. Efektive, kiu religio funkcias sen klerikalismo? Por la kredanto, la religio estas la scio de l'mito, la scio de l'dogmo kaj la konstituita teologio.

Kiam oni parolas pri teologio, oni devas konsideri ankaŭ la limigojn altruditajn de la pastraro, kaj deklaracioj pri herezoj sekvas. Kaj ĉu la scio pri la dogmo ne estas Vero, kiu estas unue revelaciita de Dio kaj poste proponata per la instruo de l'klerikaro?

Oni ĝenerale difinas klerikalismon "la opinio de l'partianoj pri la enmiksiĝo de l'klerikaro en la politiko" kaj kontraŭklerikalismon "tutaĵo de sintenoj kaj ideoj malfavoraj aŭ al la klerikaro aŭ al la religio mem".

Agema kontestado koncernas la tuton de l'kredema universo: homoj kaj pensoj, kulto kaj koncepto pri la mondo. Ekzistas nur unu vojo por atingi totalan harmonion inter liberpenso kaj religio: tiu de la praktika plurismo, toleremа kaj taŭga por dialogo.

Religia penso ne povas esti sincera kiam ĝi rilatas al iu ajn struktura religio. Kontraŭe ĝi devas esti la rekta ligilo inter la estulo kaj la transcendeco.

**Edgard JAMART**



# ĈU EKZISTAS VOJO AL FELIĈO?

*Antaŭ kelkaj jaroj, dum agrabla bicikla promenado laŭlonge de rivero MEUSE, mi vidis trans la valo grupon da ŝvitantaj grimpantoj kiuj penegis por atingi la pinton de roka altaĵo. Ĉe la piedoj de tiu roko troviĝis paradiza paŝtejo en kiu bovoj, malatentante la ĉirkaŭaĵon, trankvile kaj mallaboreme frandis la dolĉan freŝan herbon. Mi haltis por observi la homojn kroĉitajn al la roka krutaĵo. Subite trafis min la ideo, ĉu la homoj malpravus, ĉiam klopodante atingi novajn celojn. Ĉu la bovoj estus pli feliĉaj, avidante nenion alian ol kontentigi siajn naturajn bezonojn?*

*Poste, tia pentrinda spektaklo multe cerbumigis min kaj terura malkovro trudis sin al mi. La homoj neniam estos feliĉaj, ĉar ili posedas inteligentan imagon, kiu prezentas al ili larĝan faskon da avidindaĵoj. Tiuj grimpantoj, kial ili volis atingi tiun montpinton? Ĉu por vidi la alian flankon? Ĉu por provi, pruvi al si mem sian superecon? Kial? Miaj bovoj, kiuj ne estis kapablaj imagi ion ajn, ŝajnis sperti ege pli trankvilan vivon.*

*Tiu naiva vera rakonteto enkondukas gravan demandon: kiel efike agadi kaj pensi por esti ĉiam feliĉa? Mia Dio, ĉu estas eble trovi solvon por tia problemo kiu tiklas la homojn de antaŭ jarcentoj?*

*Kion signifas feliĉo? Ĉu ĉiuj same komprenas tiun vorton? Evidente ne! La pro malsato suferanta homo, kiu bezonas tason da rizo por daŭrigi sian vivon, ne povas havi la saman ideon pri tia komprenaĵo, kiel la riĉulo kiu ĝuas oran abundecon, kvankam li verŝajne ankaŭ sopiras al ĉiam pli altaj celoj. La vivcirkonstancoj, la familio, la ricevita edukado, la sano ktp. ludas decidigan rolon en la koncepto de feliĉo kiun ĉiu homo faras por si mem.*

*Kompare al la bestoj, ni suferas pro io terura, t.e. nia granda cerbo kiu permesas al ni imagi la estontecon kaj jes ja, ankaŭ nian morton. Tiaj imagoj*

maltrankviligas nin kaj determinas nian sintenon. Nia inteligenteco sendube kunlaboris al progreso de nia materia komforto. Ĉu tiu ĉi vere feliĉigas nin? Ĉu la vivo en gigantaj urboj, kie milionoj da homoj kunvivas en streĉaj kondiĉoj, kie la plej granda malriĉeco apudestas la malrespektan pompon de luksaj vivoj, povas akceli la ekfloradon de la homoj? Ĉu Pigmeoj, kiuj vivas laŭ la naturleĝoj en la bela tropika arbaro ne estas pli feliĉaj ol la homoj kiuj luktas en niaj tiel nomataj civilizitaj urbegoj kontraŭ la perforto, la tokso, la aideso, kiuj devas perlabori tiom multan monon kiom eble kaj kiuj enspiras venenitan aeron? Ŝajnas al mi ke meti la demandon estas jam respondi ĝin.

Povas esti ke tiuj premicoj unuavice ne vere rilatas kun nia temo. Ili tamen igis nin kapablaj malkovri unu el la precipaj kaŭzoj de malfeliĉo kaj tial ili montras unu respondon al la ĉiama demando: kiel trovi la feliĉon?

Multaj filozofoj proponis moderigi nian apetiton al materiaj posedaĵoj. Kaj ili pravis. Laŭ mi, neniu pli efike ol Sidarta Gotamo, t.e. Budho, sukcesis klarigi kiel trafe regi nian vivon por atingi staton de feliĉo, nome li instruis al ni havi alian vidpunkton pri ĉiuj okazaĵoj, kompreni la budhismon. (Tiurilate, legu la broŝuron "**La racia kaj ateisma budhismo**", SAT-broŝurservo). Mi citos du eltiraĵojn de Budho kiuj sufiĉe trafe resumas lian instruon.

Jen la unua : la Tria Nobla Vero

"Tio ĉi estas la nobla vero pri la estingo de la sufero. Ĝi ja konsistas el la senrestaĵa estingo de la sopira soifo: la forlaso kaj ĉesigo de ĝi, liberiĝo kaj sensoifiĝo."

Jen la dua:

"Kiam la vera sekvanto de la Vekiĝinto (t.e. Budho) ekkomprenas kiom nedaŭraj kaj eĉ efemeraj estas ĉiuj komponaĵoj fenomenoj kaj statoj, li lernas pacience toleri kaj elteni eĉ la plej grandan malfeliĉon."

Tiuj ĉi eltiraĵoj pli malpli bone komprenigas la esencon de la budhismo. Rimarkinde estas ke la vera budhismo ne estas religio, ĉar ĝi agnoskas nenian Dion.

En tia vojo mi serĉas la feliĉon, kvankam mi ne estas budhisto. Mi provas forpeli ĉiajn dezirojn al ne



nepre mistrafendaj aĵoj. Dirende estas ke mi ne ĉiam pensis tiel. Kiam mi estis pli juna, mia avidemo al materiaj posedaĵoj kaj al la sensaj plezuroj estis granda, kvankam jam tiam mi ne suferis se mi ne estis kapabla kontentigi ĉiajn dezirojn miajn. Mi ĉiam facile limigis miajn sopirojn.

Nur pli freŝdate mi lernis taksi la okazaĵojn laŭ iliaj ĝustaj valoroj. La maljuneco ne havas nur maloportunaĵojn. Ĝi ankaŭ donacas, kune kun animtrankvilecon, iom da saĝeco kaj ĝi permesas al mi malkovri la ĉarmojn de pli intelekta vivo. (Tion mi dankas al Esperanto).

La morton mi tute ne timas, kondiĉe ke ĝi ne estu akompanata de longa suferperiodo. Mi scias ke mi plenumis la taskon kiun la naturo postulis de mi. Ni naskis tri infanojn en kiuj mia vivo pludaŭras, ĉar ili estas partoj de mi kaj de mia edzino. Ili nun devas, sen nia helpo, serĉi siajn proprajn vojojn al feliĉo. Sanktan devon ni ŝuldas al ili, t.e. lasi mondon tiom puran kiom eble en kiu sana vivo ankoraŭ estos ebla. Sed tio estas alia problemo.

Mi konkludas. Ĉiu homo devas serĉi kaj trovi sian vojon. La legado de la filozofoj estas bona helpo en tia serĉado, eĉ se, unuavide, iliaj verkaĵoj ŝajnas tedaj. Mi spertis ke la grekaj antikvaj filozofoj verkis tiel ke ili estas ankoraŭ aktualaj kaj ke oni tre facile legas ilin.

***Henri CASTIAU***

"Laŭdire, mono ne alportas feliĉon. Tio veras. Sed provu komprenigi tion al tiuj, kiuj tion asertas!"

"Feliĉo konsistas en kredo, ke la aliuloj estas malpli feliĉaj ol ni."

"Inter la minacoj de Dio kaj la tentoj de l' Diablo ne eblas vivi trankvile."

El "**Pensoj**" de AZORIN
elfrancigis Kristiano.

**- la venonta numero aperos fine de januaro -**

Ni petas vin de nun pensi pri reabono. Tiucele konsultu la ĉi-suban tabelon por ekscii pri via situacio.

Se vi havas konto ĉe L!/BS (A aŭ B) kun sufiĉa monprovizo, via reabono okazos aŭtomate per elpreno de 60 FF (aŭ 80 por ekstereŭropanoj) el via konto.
Se ne, prefere ĝiru la abonprezon rekte al nia poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux, profite al CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS (nepre ne al Baudé!).
En kelkaj landoj estas oportune sin turni al la

# perantoj

Aùstralio : Vlado KOSEF, 58 Green St., COBAR, NSW 2835

Brazilio : G. LEDON, Rua Maria Aparecida Anacleto 111, 04809 SÃO PAULO
aù : Brazila Esperanto-Ligo, C.P. 11-1105, 70084 BRASILIA-DF

Britio : Edward OCKEY, Longvida, 15 Upper Pines, Woodmansterne BANSTEAD, SM7 3PU

Bulgario : Ganĉo DAMJANOV, Makariopolski 7, 6100 KAZANLAK

Germanio : Manfred FUHRER, Am Stadtpfad 11, W-6236 ESCHBORN
Pagi al : Libera Esperanto-Asocio, Sonderkonto Bücherdienst
Poŝtĝiro Karlsruhe 2125 01-759, BLZ 660 100 75

Japanio : MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO-si, Hyôgo-ken, 671 01

Sovetio : Georgij TUJAKIN, 33A-114, Kornejĉukstrato, 127543 MOSKVO

Svedio : Pelle PERSSON, Svartviksvägen 14, 123 52 FARSTA

Ĝenerale peras : SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 PARIS
kaj UEA-sidejo, kie eblas pagi al la konto "ljpb-b", indikante ke temas pri abono al **Laŭte.**

*Via abono al **Laŭte!** estas* **finita** ~~registrita ĝis~~ :

*En via BS/L!-konto* ***restas :*** 38,2
~~***mankas :***~~

***********************************************************

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville. CPPAP 58651